



Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

1993






Krys Ungar kaj Emile Van Damme, du novaj talentoj en la poezia firmamento, prezentas al vi faskon da poemoj pri hodiaŭaj temoj: jen humuraj, jen pensigaj, jen malgajaj. William Auld ne hezitis citi Ungar kaj Van Damme inter la plej elstaraj poetoj nunaj.

*Krys Ungar: Meznokto metropola. 360 BEF + afranko.
Emile Van Damme: Dolçe amare. 240 BEF + afranko*

Mendu la librojn ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ ĉe via kutima libroservo.



**NOVA
NOMSYSTEMO
POR
LINGVIKO**



MANUEL HALVELIK

Kompendio pri lingvistiko, en formo de vortaro kun difinoj.

*Nova metodo de gramatika analizado, sur ĉiuj niveloj, konforme al nova teorio.
Nova kvantiga procedo, geometrie prezentbla.*

Nova distribuo de lingvistikaj branĉoj kaj konceptoj.

Nova terminografio por lingva genealogio.

Nova nomenklatur, esprimita per nova lingvaĵo: Universala Esperanto.

Formato A4 - 300 p. - 930 BEF + afranko - Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

Esperanto = Interlingvo?

JES!

Ĉar nun ekzistas la

HUNGARA LINGVOKURSO


Enkonduko kaj kurso pri tiu finn-ugra lingvo, kun multaj klarigoj, tekstoj ekzercoj kaj plena vortlisto.

Mendu ĝin ĉe FEL (810 Belgaj frankoj + afranko) aŭ ĉe via kutima libroservo.

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en

praktika plasta kolektilo!

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Prezo 360 BEF (inkl. afrankon). Se vi mendas 2 ekzemplerojn, vi ricevos trian senpage!

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondinto: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anonctarifo: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciui la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipa ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Andy E. Künzli, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) □ represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-raĵto ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NORAF □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.



Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	13
Medio	17
Scienco	18
Ekonomio	20
Turismo	21
Lingvo	22
Libroj	25
Novelo	26
Poezio	27
Eseo	28
Muziko	29
Kuirado	30

„Halo, kun MONATO?” „Jes, sinjorino, per kio ni povas helpi vin?” „Ĉu vi scias, kiu momente estas la prezidanto de Azerbajĝano? Ni ĵus havis diskuton pri tio, kaj...”. Bedaŭrinde, la oficisto de MONATO ne sciis, kiu estas la nuna prezidanto de tiu nova ŝtato, kaj la diskuto tie eble ankoraŭ daŭras. Ni eldonas la magazinon, sed ne parkeras ĝin... Estus tamen foje utile povi trovi en MONATO facilmaniere la plej gravajn lastatempajn novaĵojn. Pro tio Andy Künzli, nia redaktoro pri politiko, ekde tiu ĉi monato prezentas al vi koncizan superrigardon pri la plej gravaj politikaj okazaĵoj de la antaŭa monato. Vi trovos ĝin ĉi foje en paĝo 9 kaj retrovos ĝin ĉiumonate en la sama kadreto. Ĉu la donitaĵoj utilos al vi same kiel al ni?

Ankaŭ en la rubriko „lingvo” vi trovos novaĵon. En paĝo 22 aperas la unua en serio de artikoloj de Bradley Kendal pri „La mondaj lingvoj”. Hodiaŭ vi povos legi faktojn pri la ĉina, sendube la plej multe parolata lingvo. Jam kompostitaj, kaj baldaŭ aperontaj, estas artikoloj pri la rusa kaj la angla.

Se vi jam trafolumis la nunan numeron, vi trovos ke ĝi estas tre riĉa je fotoj. Ni esperas povi daŭrigi tiel dum la tuta jarkolekto 1993 kaj kompreneble ankaŭ poste. Pri tio klare admonas nin ankaŭ la politikistoj sur la kovrilo, kiuj ja ŝatas vidi sin mem en grava internacia magazino ankaŭ en 1993. Ni cetere apelacias al ĉiuj kunlaborantoj kaj al tiuj kiuj de tempo al tempo sendas artikolon al la redakcio: seeble aldonu bonajn nigra-blankajn fotojn al viaj artikoloj. La formato ne gravas. Ni ja povas laŭplaĉe redukti aŭ grandigi ilin.

Foje leganto demandas nin, ĉu li rajtas sendi artikolon al MONATO. Kvankam aperigitaj tekstoj plej ofte venas de niaj kunlaborantoj, - homoj kiuj pli-malpli regule verkas por la magazino, - kontribuoj de legantoj certe estas bonvenaj. MONATO tamen ne povas garantii, ke tiuj tekstoj aperos. Alvenas ja multe pli da manuskriptoj ol unu numero povas enhavi. Pro tio la redaktoroj vole-nevole devas ĉiumonate fari elekton inter la ricevita materialo. Ĉu al kelkaj manuskriptoj MONATO donas prioritaton dum la elektado? Jes, estu certa, ke koncizaj tekstoj en flua, senerara Esperanto pli rapide trairas la maŝojn de la retoj ol plurpaĝa manifesto!

Ni petas niajn legantojn kaj kunlaborantojn atenti pri la jenaj adresoj de niaj redaktoroj. Manuskriptoj por la koncernaj rubrikoj sendu rekte al ili, kaj ne unue al la eldonejo.

Krys Ungar (rubrikoj ,scienco' kaj ,arto'): „Verdejo”, 59 Furlong Avenue, Arnold, Nottingham NG5 7AS, Britio.

Evgeni Georgiev (rubriko ,hobio'): Baĉo Kiro 35 II, BG-1202 Sofia, Bulgario.

Timothy B. Carr (rubriko ,medio'): Gordon House, 211 Bedford Street, Crewe CW2 6JL, Cheshire, Britio.

Marco Gazzetta (rubriko ,kuirado'): via Antonio Pignatelli 27, interno 17, I-00153 Roma, Italio.

Multe da legplezuro deziras al vi la redaktora skipo.

Invado de islandanoj

Fine de 1992 Dublino, iam urbo de vikingoj, estis refoje invadita de okcident-skandinavaj hordoj. La feliĉe pacemaj kaj ege bonvenaj modernaj vikingoj estis islandanoj kiuj venis por fari siajn antaŭ-kristnaskajn aĉetojn. Ŝajne prezoj kaj kvalitoj de varoj estas por islandanoj tiel favoraj, ke eĉ pagante vojaĝkostojn de Reykjavík al Dublino, la ekskurso valoras la penon kaj elspezon. GMA

Azia banko honorita

Bangladeŝa ŝparbanko Gramin ricevis en novembro pasintjare la belgan premion Fondaĵo Reĝo Baldueno pri evoluigo. La azia banko estas honorita pro sia apogo al la virina rolo en evoluigado, kaj pro sia originala prunt-sistemo, kiu kontribuas al plibonigo de la sociaj kaj materiaj vivo-kondiĉoj de la kamparaj virinoj kaj ties familioj. La Gramin-banko, kiu estis elektita inter 142 kandidatoj, estas kooperativa ŝparbanko kiu direktas sian agadon nur al la malriĉuloj. Ĝi estas laŭ la fondaĵo la sola banko kiu elpensis funkciantan sistemon pri monprunto al homoj sen enspezoj.

Alex HUMET

Fajrobrigado kaŭzas incendion


La fajrobrigado de Norrsundet en Svedio faris ekzercon. Ĝi bruligis malnovan forigotan konstruaĵon. Sed la vento kredeble portis fajrerojn en lignoprovizejon 300 metrojn malproksime, ĉar tiu komencis bruli kaj rapide la fajro disvastiĝis. La fajrobrigado ne povis malhelpi ke 30 mil kubaj metroj da segita ligno konsumiĝu de la fajro. Enkalkulante la magazemon, valoroj de 70 milionoj da svedaj kronoj malaperis en la flamoj.

Lennart PERSSON

Verda krizo

La et-eta brita verda partio krizas. Du plej eminentaj verduloj, membroj de la kompromisema 'realula' alo de la partio, forlasis la movadon, dirante, ke la partio subfosiĝas de membroj de ideologie strikta, 'fundamentula' alo. En 1989 britaj verduloj kaptis 15 % da voĉoj (tamen pro manko de proporcia voĉdona sistemo en Britio ne reprezentigis en parlamento). Lastatempe la partio rikoltis nur unu-du procentojn kaj membreco ŝrumpis ĝis nur 8000.

Paŭlo GUBBINS



Marĥkampa kanalo konstruita

Oriente de Vieno troviĝas fekunda ebenaĵo: Marĥkampo, kies grundakva nivelo dum la lastaj jaroj ege plimalaltiĝis. Por akvumi tiun regionon oni konstruis la marĥkampan kanalon, tra kiu unu elcento de la danuba akvo fluas en la nordan parton de tiu ebenaĵo, engrundiĝas aŭ fluas en du riveretojn. Laŭlonge de la bordoj de la kanalo oni jam nun havas la eblecon promeni aŭ bicikli; en golfetoj povas vivi tipaj plantoj kaj bestoj de la regiono. La kanalo aspektas kiel natureca rivereto kaj plibeligas la pejzaĝon.

Walter KLAG

Eksministro kondamnita

MONATO jam raportis pri la proceso kontraŭ Udo Proksch [Prokŝ] (1991/5, p. 18-19), kiu per eksplodo dronigis ŝipon por enkasigi grandan asekuran sumon. Sekvis alia proce-

so kontraŭ la aŭstria eksministro kaj parlamenta eksprezidanto Leopold Gratz [Grac], kiu havigis al sia amiko Proksch falsitajn dokumentojn el Rumanio, laŭ kiuj la kargo de la dronigita ŝipo estus urani-regenerilo kaj ne senvalora ferorubo. Por la falsa deklaro la fama socialista politikisto devas pagi monpunon: 450 000 ŝilingoj (71 000 guldenoj). La verdikto kontraŭ Proksch iĝis intertempe definitiva; la verdikto kontraŭ Gratz ankoraŭ ne.

Walter KLAG



Udo Proksch [Prokŝ], desegnita de Walter Klag.

Kanado, Japanio, Norvegio, Svisio, Usono	0,98
Aŭstralio, Francio, Nederlando	0,97
Britio, Islando, Germanio	0,96
Danio, Finnlando, Aŭstrio, Belgio	0,95
Italio, Irlando, Hispanio	0,92
Ĉeĥio, Slovakio, Hungario	0,89
Pollando, KSS	0,87
Meksiko	0,80
Brazilo, Rumanio, Kubo	0,74
Ĉinio	0,61
Maroko	0,43
Zairio	0,26
Angolo	0,17
Centrafrika Respubliko, Sudano, Nepalo	0,16
Gvineo	0,05

La malneta nacia produkto ne sufiĉas por indiki la nivelon de la homa evoluo en difinita lando. Tial Unuiĝinta Naciaro aperigas ĉiujare la Evoluan Indicon pri l' Homaro. Tiu indico entenas informojn pri supozata vivdaŭro, analfabeteco, eduka nivelo kaj pokapa enspezo.

wk

Milito kaj religio

Ne malmultaj samtempuloj suferis kulturŝokon pro la aktualaj militoj; precipe eŭropanoj demandis sin post eksplodo de la intercivitana milito en eksa Jugoslavio: „Kiel tio povas okazi, en nia epoko de klereco, sur nia civilizita kontinento, kie ĉiuj estas konvinkitaj ke nur paca kunvivado kondukas al prospero kaj progreso?” Kaj kun plia ŝoko oni konstatis, ke ofte unu el la kialoj de sangaj konfliktoj evidente estas religio, pli ĝuste religia divers-eco. Ĉu ne ĉiuj religioj predikas pacon?

Efektive en preskaŭ ĉiuj militoj, historie kaj aktuale, religio aŭ ludis rolon aŭ eĉ estis rekta kaŭzo de ties estiĝo. Persekutado de alireligianoj okazis en ĉiuj epokoj: hebreoj militis kontraŭ idolanojn, romianoj amase buĉis kristanojn ĉar tiuj ne volis agnoski la diojn de Romo, islamanoj murdis nekredantojn, poste kristanoj en krucmilitoj banis en sango de islamanoj kaj antisemitoj masakris judojn ĝis la terora kulmino de holokaŭsto, kristanaj konkerantoj kaj koloniistoj ekstermis idolanajn indiĝenajn popolojn. Nur kelkajn kilometrojn de ĉi tie, kie mi sidas kaj skribas ĉi tiujn liniojn, Aŭgsburga episkopo Ulriko kondukis armeon al venko kontraŭ turkojn (li fariĝis sanktulo!). Ni ne forgesu pri la religia 30jara milito en centra Eŭropo, kiam kristanoj diverskonfesiaj murdis unuj la aliajn per neimagebla brutaleco.

Fanatikeco

Pro religiaj motivoj mortas homoj en Hindio, en pluraj partoj de eksa Sovetio, en Irako kaj aliaj regionoj de Proksima Oriento, en Afriko. La abomeninda rasismo de Sud-Afriko nutriĝis ankaŭ el religiaj fontoj de blankaj kristanoj, kiuj sentas sin superaj al idolanaj nigruloj. La ŝtaton Israelo minacas religia fanatikeco islama, inverse judaj ekstremistoj volas elpeli islamajn arabojn. En Libano dum multaj jaroj intermilitis plej diversaj religiaj grupoj, ktp., ktp.

Sankta milito

Certe oni ne povas aserti, ke ĝenerale religioj kaŭzas militojn, kaj sendube iuj religioj aŭ pli ĝuste ties adeptoj estas pli militemaj ol aliaj. Tamen pri ĉiuj grandaj religioj oni scias, ke ili jen kaj jen parte ĝis hodiaŭ proklamas „sanktan militon”. Unu el la kialoj estas, ke ili predikas unikecon kaj ekskluzivecon, asertante ke nur la propra

religioj donas savon, kaj ke pro tio oni devas – eĉ perforte – konverti alireligianojn. Alia kialo foje estas, ke temas pri „sanktaj lokoj” de la koncerna religio, kiujn oni devas defendi aŭ rekonkeri.

Ideologia ekspluato

Sed alia aspekto eble estas pli grava: religio kutime ankaŭ estas ideologio, kaj grava karakterizaĵo de ideologio estas perforta batalemo. Ideologoj do eluzas religiojn por siaj politikaj celoj, kiel ekzemple faris la ekstrema judo-malamanto Hitler, kiu ekspluatis la kristanan antisemitismon por realigi siajn fiajn planojn – kun tolero kaj parte eĉ subteno flanke de la eklezioj. Ne malofte temas kaj temas ankaŭ nur pri tio, ke potencavidaj politikistoj sub religiaj pretekstoj pli facile povas atingi siajn militcelojn. Dum la 30jara milito princoj kaj aliaj registoj ofte plurfoje ŝanĝis la konfesion, laŭ la oportuneco militpolitika.

Ĉu do akuzi kaj kondamni ĉiujn religiojn? Certe ne, ĉar religioj evoluis kaj evoluigis ĝeneralan etikon. Kristanismo, ekzemple, esence kontribuis al elformado de okcidenta humanismo, kiu rigardas militon kiel maltaŭgan rimedon kaj strebas solvi konfliktojn per pacaj diplomaciaj rimedoj. Tamen kaj tiu ĉi humanismo kaj kristanismo ankoraŭ defendas la ideon de defendmilito, kvankam evidente paco povos definitive regi nur kiam ekzistoj neniuj kaj neniaj armiloj kaj bataliloj.

Daŭra kulturŝoko

Sed malgraŭ tio neniuj kristanoj hodiaŭ povas pravigi militon per sia religio; religiaj gvidantoj, ĉepinte la papo romkatolika, ne laciĝas kondamni militojn. Bedaŭrinde ties subuloj, eĉ pastroj pri-fajfas iliajn alvokojn. Do ni devas daŭre vivi kun tiu komence menciita kulturŝoko, ke homoj sen kaj kun religio fariĝas subite pli brutalaj ol bestaĉoj. Stefan MAUL



Lingvo: daŭra bataalkampo (1)

Ne la internaj kvalitoj de lingvo, sed la sociaj kaj politikaj cirkonstancoj igas lingvon sukcesa aŭ disfalanta. Ekzemple, tre etaj estas la diferencoj inter la kataluna kaj la okcitana – kvaŭ sama lingvo estas ambaŭ – sed sur la kampo de rajtoj, ili malsamas kiel tago kaj nokto. Tion montris la artikolo de Hektor Alòs i Font (MONATO 1992/11, p. 20). En suda Katalunio oni fieras pri la lingvo, oni ĉiuokaze antaŭenpuŝas ĝin. Kontraŭe, en Okcitanio oni hontis pri ĝi kaj tabuas ĝin. Pro tio estas des pli konsiderinda la strebado de la dek okcitanaj lernejoj menciitaj de la aŭtoro. Tie „la instruado okazas nur en la loka lingvo”. Tamen, tiuj *Calandreta*-lernejoj enkondukas la francan lingvon ekde la dua jaro de la elementa nivelo. Iom post iom kreskas poste la parto de la franca, kvankam la okcitana ludas ĉiam la plej gravan rolon. La celo estas dulingveco, ne unulingveco. En la francaj limoj, eksperimentoj tute similaj funkciadas aliloke: en Eŭskio en la *Seaska*-lernejoj, en norda Katalunio en la *Arrels*- kaj *Bressola*-lernejoj kaj en Bretonio en la *Diwan*-lernejoj. La eŭskoj ludis pioniran rolon, per la fondo de la unua tiaspeca lernejo en 1969. Sekvis *Diwan* en 1977, kaj iom poste norda Katalunio kaj Okcitanio. Temas fakte pri vere nova pedagogia vojo per kiu estas instruataj ĉi-jare proksimume 3000 infanoj kaj adoleskoj (1150 el ili en Eŭskio, kaj 950 en Bretonio). Certe etskalaj estas ankoraŭ tiuj eksperimentoj pere de movadaj strebadoj. Tamen, rilate al la ĝisnunaj francaj kutimoj de instruado per nur la ŝtata lingvo, taksindas tiuj ŝanĝoj nepre kiel gravaj kaj esperoplenaj.

Jorj Abhervé-Guéguen,
Bretonio (Francio)

Lingvo: daŭra bataalkampo (2)

Jam de pli ol kvar jaroj mi loĝas apud Tuluzo – ofte nomata la ĉefurbo de Okcitanio. Ekde tiam mi klopodas ekscii pli pri tiu mistera lingvo, ŝajne malaperinta. Inter la sennombraj studentoj kiujn mi pridemandis, mi finfine trovis du kiuj scipovis paroli okcitanane. Kaj fakte jam je mallonga distanco de Tuluzo estas malfacile ekscii ĉu la loka dialekto apartenas ĉu al la okcitana, ĉu al la franca. Tiam mi renkontis mian edzinon, kaj iom post iom ĉio ŝanĝiĝis. Post refoja insistado mi (kaj finfine ankaŭ ŝi mem) komprenis ke dum sia juneco, ŝi ofte aŭdis la okcitanan kaj tute bone komprenas tiun lingvon. Plia paŝo estis la naskiĝo de nia filino. Same kiel mi parolas al ŝi

germane por ke ŝi lernu la patran lingvon, ni volas ke ŝi ankaŭ lernu la praaŭvan. Tio tamen estas malfacila afero, eĉ meze de Okcitanio. Ni ambaŭ eklernis la lingvon: pere de libroj (malfacile troveblaj nur ĉe tradiciemaj librovendistoj), de perkorespondaj kursoj, k.s. Estas interese ankaŭ lerni la langvedokan dialekton, ĉar okcitanoj utiligas ĝin kiel pontlingvon inter la gaskona, la provenca kaj la nordaj dialektoj. Krome la metodoj mencias kiel malsamas unu lingvo de la alia, ĉar la konsciaj okcitanoj fieras pri tiu riĉeco. Lingvo tamen nur vivas se iu uzas ĝin. La 11a-jarcentaj trobadoroj evoluigis novan literaturan stilon, la amkanton kaj la skriban lingvon apenaŭ modernigitan ankoraŭ uzatan hodiaŭ. La lingvo belsonas, kun kantanta ritmo iom simila al la itala. Dum ĉijara opinisondado en unu el la ses francaj regionoj plejparte okcitanaj oni eksciis ke 30 % ankoraŭ parolas kaj pli 20 % komprenas ĝin. Krome, 80 % opinias ke ĝi instruendas ĉiunivele en la lernejo. Ŝajnas tamen, ke ili faras nenion por akiri tiun rajton por siaj infanoj. La registaro ne plu luktas kontraŭ la lingvo, eĉ time subtenas ĝin sed ne vere volas helpi. Mitterrand rifuzas subskribi la Eŭropan Ĉarton pri la Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj, kiu celas almenaŭ la agnoskon de tiuj lingvoj. Mi tial timas ke Hektor Alòs i Font pravas pri la nigra estonteco. Mi obstine luktos kontraŭ tio — kaj tio estas bona ebleco por varbi por la internacia lingvo kies idealoj estas tute malaj al tiuj de la subpremema franca lingvo.

Daniel Pfeiffer, Okcitanio (Francio)

Dankon kaj gratulon

Mi tre ĝojis ke mi ricevis la januaran numeron de MONATO jam fine de decembro. Daŭrigu tiel, se vi povas. Ĝis nun mi legis nur tri rubrikojn en ĝi: pri humuro mi volas rimarki ke evidente homoj tre malsame opinias pri ĝi, sed ĉu vere valoras dediĉi tutan paĝon al humuraĵoj, kiuj ĝenerale ne estas aparte novaj aŭ spritaj? La rinocero tamen plaĉis al mi. Pri medio mi diras nur tion, ke evidente en nuntempa revuo ĝi ne povas malĉeesti. Mi ne dubas ke sub redaktado de Tim Carr ĝi iĝos ege interesa. Pri la rubriko leteroj mi reagos en aparta kontribuaĵo.

Sabine Meyer, Germanio

Dekstriĝinta revuo

Fakte la letero de Albert Cnudde (MONATO, 1993/1, p. 7) instigis min al reago. Jam antaŭe mi plendis pri artikolo, kiu prezentis torditan bildon

pri la riĉeco de germanoj. Tiam mi elektis nur tiun punkteton, sed prisi-lentis ion pli gravan. Fakte, ankaŭ min tedas la maniero, en kiu MONATO raportas pri kapitalismaj ideoj. Mi havas la senton ke la revuo pli kaj pli dekstriĝas. Mi ne postulas ke MONATO estu socialisma, sed ja ke ĝi estu neŭtrala. Precipe dum 1992 mi ofte konsterniĝis pro kontribuaĵoj, kiuj similas propagandilojn de iu kapitalisma partio aŭ la katolika eklezio. Prave vi atentigas s-ron Cnudde pri la fakto, ke post ĉiu artikolo MONATO, mencias kiu „ŝipano” verkis la koncernan tekston. Oni povus nun relevi la demandon, kial tiom da ŝipanoj ŝajne ne havas ordinarajn nomojn, sed nur misterajn mallongigojn. Pri tio tamen ne temas. Multe pli grava estas la demando: ĉu la „ŝipo” povas resti neŭtrala, se la plejparto de la „ŝipanaro” ne estas tia? Krome estus tre interese scii la kialon de la nuna evoluo. Kial aperas pli kaj pli da artikoloj verkitaj de homoj religiemaj kaj dekstremaj? Ĉu ĉar MONATO havas apartan allogon por tiaj homoj? Ĉu pro la nura kialo, ke nur tiuj homoj verkas artikolojn?

Sabine Meyer, Germanio

Fremdulmalamo

Timigas min la nuna fremdulmalamo kiu kreskas en la eŭropaj landoj. Tamen tiuj landoj subskribis la ĉarton pri homaj rajtoj. Plej timige en la evoluo estas la ĉiam ripetita aserto ke fremduloj ŝtelas la laboron de la origina loĝantaro. Se tiaj opinioj daŭros, mi pensas ke ni baldaŭ revenas al iu faŝisma epoko en kiuj ĉiuj malplimultoj — kaj kial ne ankaŭ lingvaj — estos minacataj. Esperantistoj kontraŭbatalu la fremdulmalamon.

Sébastien Conoir, Francio

Ateismo ne malmorala

Georges Lagrange priskribis (MONATO, 1992/11, p. 6) „mikspoton” mian artikolon (MONATO, 1992/10, p. 16) ĉar mi senatente inkludis „ateismon” en la ĝenerala moralmal-kreskeco en nuntempa Aŭstralio. Mi konfesas mian eraron, kaj mi al li pardonpetas. Kiel li atentigis, krimo ne rilatas al ateismo. Alia demando pri ateismo tamen interesas min: Ĉu ateistoj neas nur la kristanan dion aŭ ĉu ili simile neas tiajn ideojn kiaj: universala potenco, senfina menso, kosma konscio, ktp.? Kion fakte signifas ateismon? Mi ŝatus legi pri tio la opiniojn de la legantoj.

K. Montefiore, Aŭstralio

Redakcia reago

Ni dankas al Sabine Meyer pro ŝia afabla letero. Tamen ni ankaŭ volas respondi. Unue pri la mal-longigoj kaj kaŝnomoj: mi trafolumis la lastan jarkolekton de MONATO kaj devis konstati ke tamen la nombro da neklaraj nomoj estas malalta. Ili aperas nur en du kazoj. Unue en la rubriko NOTICOJ (ĉar tie la tuta nomo de verkinto estus preskaŭ pli longa ol la notico mem!) kaj due por protekti homojn kiuj loĝas en „malstabilaj” regionoj kaj timas persekutojn. Kelkaj, ekz. NikSt kaj Araneo, ankoraŭ nun uzas tiun tiaman pseŭdonimon, ĉar ili tiel iĝis konataj. Pri la direkto kiun iras MONATO oni povas eterne diskuti. Ĉu vere la ŝipanaro estas tiel dekstrema? Eble aliaj legantoj opinias la malon. Ĉu eble artikoloj pri kiuj oni malkonsentas, instigas koleron kaj tial restas pli longe aktivaj en la kapo? Estus bona ideo nombri la artikolojn pri kiuj oni malkonsentas kaj tiujn pri kiuj oni havas saman opinion. Tiam oni povas kompari la rezultojn: kaj tiu rezulto estos pli konvinka por la legantaro, ĉar tiam temas pri „objektivaj” datumoj, kiujn eĉ ni ne povos kontraŭi.

MONATO daŭre klopodas esti neŭtrala, kaj iomete pli amika al „la endanĝerigitaj specioj”, al kiu ĝi fakte mem apartenas.

*gvd, redaktoro
(la tutan nomon vi trovos en la kolofono)*

Virinaj pastroj

La intervjuo kun monsinjoro Ernst, episkopo de Breda, estis tre leginda. Aldone menciindas, ke la episkopo ne ekskludas inajn pastrojn en la romkatolika eklezio. Li montriĝis defendanto de iu malferma diskuto pri tiu temo. Tamen en tia diskuto, ĉiu respektu la oficialan starpunkton de la eklezio. Li nepre prenas serioze tiujn virinojn, kiuj volas kandidatiĝi por la pastra ofico. Ĝis nun la monda episkoparo sekvis la historian fakton ke Jesuo elektis nur virojn al la apostola ofico. Nuntempe tamen ankaŭ gravas la opinio de multaj virinoj ke „unueco de viro kaj virino en Kristo ankaŭ entenas egalecon en la ofico”. Laŭ la episkopo, tiuj virinoj sentas la rifuzemon de la eklezio „kiel malagnoskon de sia virineco”. Ankoraŭ en 1976 la Vatikana Kongregacio por la Doktrino dekretis, ke virinoj ne povas

pastrigi. Kaj la nederlanda episkopo Simonis antaŭ nelonge sciigis, ke virino „ĝis en eterneco” ne povas fariĝi pastro. Ŝajnas ke episkopo Ernst ne same rigore opinias pri la afero.

Jacques Tuinder, Nederlando

Zairio kaj Belgio

En MONATO aperis en la antaŭaj monatoj kelkaj tekstoj kaj leteroj de zairianoj kaj belgoj rilate la konduton de belgoj dum la kolonia periodo de Zairio. Fakte la kverelado fontas el la konfuzo de du diversaj aferoj: la sendependa ŝtato Kongo — posedaĵo de la tiama belga reĝo Leopold dua — (1885-1908) kaj la kolonio Belga Kongo (1908-1960). Tiujn du oni prefere ne konfuzu. En la unua periodo la belga reĝo bezonis homojn por administri lian posedaĵon. Ĉar malmultaj pretis iri tien, li nepre devis dungii homojn el plej diversaj sociaj tavoloj. Tiuj homoj ege malbone kondukis. Post 1908 la situacio tiurilate multe ŝanĝiĝis kaj en la kolonion Belgio enkondukis multajn bonajn servojn. Tamen la memoro je la malbona konduto de „la belgoj” restis. Kiam la novaj gvidantoj post la sendependiĝo ne sukcesis bone organizi sian landon, ili agis same kiel siaj kolegoj en aliaj landoj: la kaŭzoj de la malbonfarto ne troviĝas ĉe ili sed ĉe la koloniintoj. Ne estis malfacile trovi verkistojn de lernolibroj, kiuj klare ilustrus tion. Tamen, ĝenerale la nuntempaj zairianoj ne tiel malŝatas aŭ riproĉas la belgojn — almenaŭ mi neniam spertis tion, kaj ankaŭ en mia nuna medio ne spertas. Zairiaj amikoj miaj ĉi tie en Gabono nomas min „sia belga frato”. Sub la kolonia regado de Belgio Zairio prosperis kaj poste havis la eblecon iĝi la plej bonfarta lando de Afriko. Tamen ĝi sinkis en mizeron, malgraŭ la amasa subteno kiun ĝi ricevis de Belgio. Kiusence tio estas la kulpo de la iamaj belgaj koloniistoj? Ĉiukaze, kiam mi antaŭ nelonge vizitis la urbon Bukavu, kie mi loĝis en 1955, kaj vidis la ĝeneralan ruiniĝon kaj kadukiĝon, mi komprenis ke la nuna Zairio estas io alia ol la Belga Kongo de antaŭe.

W. De Smet, Gabono

Kia honto pri kia Eŭropo?

Estas mirige ke franco hontas pro la ne-informiteco de siaj samnacionoj, kiuj kaŭzis la preskaŭan katastrofon en la referendumo pri „Maastricht” en Francio (MONATO, 1992/11, p. 17).

Ŝajnas ke li volas aserti, ke sufiĉis la informoj kaj klerigoj kaj ke tiuj aŭtomate kondukas al aprobo de la projektita Eŭropa Unuiĝo. Koncerne tion oni ege povas malkonsenti. Eĉ se multaj malaprobis pro nescio, same multaj malaprobis bone sciante ke Maastricht signifas neinvertigeblan evoluon en la proceso de eŭropa unuiĝo. Historio pruvas ke ĝis nun preskaŭ neniam pli grandaj unuoj malgrandigis la mediajn problemojn aŭ pliliberigis etnajn malplimultojn. Nunaj spertoj eĉ instruas: ju pli granda iu unuo, des pli granda la damaĝo al naturo kaj kulturo. Nur ekonomio prosperas pro pligrandiĝo. Kaj la fundamento de la eŭropa unuiĝo — cetero ne mirige — estas la ideologio de ekonomia kreskado. Ĝi vekas esperojn pri pli alta vivnivelo (kaj en la neevoluitaj regionoj, kaj en la alte evoluitaj), sed la nuntempa leĝaro absolute neglektas la rajton de la naturo, la rajton de la homo pri sana vivmedio. Same ĝi neglektas egalrajtigitan leĝodonan partoprenon de diversaj etnaj regionoj kaj grupiĝoj. Honesta ekologi-dependa politiko ne povas akcepti EK-n laŭ tiaj detruaj principoj. La nuntempa eŭropa evoluo estas absolute dubinda afero. La plej dubinda argumento estas tiu, ke la estontaj generacioj rikoltos la fruktojn de la nuna periodo. Pli verŝajne la malo ĝustos. Honto estas, ke tiu detrua ideologio de egoisma konsumo surbaze de nur aŭ ĉefe ekonomiaj parametroj determinos la destinon de nia kontinento antaŭ ol nova ideologio de „malpli estas pli!” povas fiksiĝi en la konscio de la civitanoj. Eble ni ankaŭ sur tiu ŝtupo de la planeda evoluo unue devas suferi katastrofojn por eklerni.

Wolfgang Gunther, Germanio

Doloriga realo

Mi kontraŭas al la artikolo „Doloriga realo” (MONATO, 1992/5, p. 18). Mi laboras ĉe aŭtomobila kompanio, kiu havas tri grandajn fabrikojn en la mondo, t.e. Sajama, Suzuka en Japanio kaj Ohio en Usono. Inter tiuj fabrikoj ne troviĝas diferenco de efikeco. Diferenco troviĝas, ne inter landoj, sed inter kompanioj. Kutime efikeco estas mezurita per produkto de homoj oble horoj. Komparo per nur horoj ne havas signifon. Aŭtoj produktitaj en Usono estas usonaj aŭtoj. 37% estas malprava laŭ tiu vidpunkto. Multaj usonanoj laboras en nia fabriko, kaj multaj japanoj laboras en la fabriko en Ohio. Ni sentas, ke ni kunlaboras por klientoj en la mondo.

Uĉida Masatomo, Japanio

EŬROPA INTEGRIGO

Svisa erinaco diris ,ne!'

La 6an de decembro per tutlanda baloto la svisoj rifuzis la aliĝon de sia lando al la Eŭropa Ekonomia Sfero (EES). La EES-kontrakto antaŭvidis la efektivigon de la t.n. „kvar liberoj” de la interŝtata merkato por ĉiuj EK- kaj ELKA-landoj (vidu la apudan grafikaĵon): liberaj varo-, persono-, servo- kaj kapitalo-trafikoj ekde la 1a de januaro 1993.

Emocioj kaj necerteco

La tutlandan voĉdonon antaŭis emociplenaj propagandokampanjoj de poruloj kaj kontraŭuloj de la kontrakto. Ambaŭ flankoj disvastigis timojn pri la estonto. Kontraŭuloj de la EES-aliĝo timis, ke la kontrakto alportos al Svislando aron da malavantaĝoj: i.a. pli malaltaj salajroj, pli altaj luprezoj, interezoj kaj impostoj, pli da eksterlandanoj kun rajto loĝi kaj labori kaj per tio pli da senlaboraj svisoj; oni profetis kvalitoperdon de la svisa ekonomio kaj promesis pli da burokratio („eŭrokratio”). Estis precipe avertite pri la danĝero de fremdaj leĝoj, kiuj alportos al la lando perdon je suvereneco kaj libero. Krom tio multaj timis, ke EES kondukos rekte al EK-membreco. En Bruselo multaj vidas nur novan diktaturon kaj superfluan eŭrocentrismon.

Apogantoj volis eviti izoliĝon

Aliflanke, la EES-pledantoj akcentadis la avantaĝojn de la eŭropa integriĝa politiko por Svislando. Por solvi la nuntempajn sociajn kaj ekonomiajn problemojn de la lando, necesus reale partopreni en la kreota eŭropa ekonomia sistemo. Alternativo ne ekzistus. Inter la multnombraj efikoj de la EES-aliĝo estis menciitaj: vasta malfermiĝo de la ekonomio kaj merkato, pli da konkurenco, produktiveco kaj investado, kresko de la malneta socia produkto kaj redukto de la svisa senlaboreco, kies nombro novembre cetere kreskis timige al 120 000 aŭ 3,9 % (komparu la artikolon en MONATO 12/1992, p. 11). La registaroj de la konfederacio kaj de ĉiuj kantonoj, krome ĉiuj plej gravaj politikaj par-




tioj, unuiĝoj kaj sindikatoj kaj la plimulto de la amaskomunikiloj diris jes al la EES-kontrakto. Ili ĉiuj estis konvinkitaj, ke la risko „iri sola” en Eŭropo estos verŝajne pli granda ol la EES-membreco.

Post optimismo malvarma duŝo

Kiel konate, en aŭtenta rekta demokratio kian praktikas Svislando, la popolo kaj la kantonoj (la du suverenoj) prononcas la „lastan vorton”.

EŬROPA EKONOMIA SFERO (EES)



Ni devas alkutimiĝi al nova mallongigo: EES por Eŭropa Ekonomia Sfero, la tutmonde plej aĉetopova merkato. Kvankam en ties 18 ŝtatoj vivas eĉ ne 7 elcentoj de l' homaro, EES realigas 31 elcentojn de l' monda ekonomia rendimento kaj 43 elcentojn de l' importado kaj eksportado. Tiun ĉi imponan merkaton konsistigas la 12 membroj-ŝtatoj de Eŭropa Komunumo (EK) kaj ses el la sep ŝtatoj, kiuj membras en Eŭropa Liber-Komerca Asocio (ELKA). Nur ses pro tio, ĉar la popolo de Svisio, la sepa ELKA-membro, en referendumo malakceptis la kontrakton de ELKA kun EK. EES estas ekonomia sfero pli granda ol la ĝis nun plej granda merkato Usono, kiu nun strebas pligrandigi sian sferon per kontraktoj kun Kanado kaj Meksiko; sed probable daŭros ankoraŭ konsiderinde longan tempon, ĝis realiĝos tiu ĉi plano. (USD estas la internacia simbolo de la usona dolaro.)

Tiel, registaraj proponoj aŭ decidoj povas esti renversitaj. Kelkajn tagojn antaŭ la voĉdono enketoj prognozis, ke plimulto de la voĉdonrajtaj svisoj konsentos pri la EES-kontrakto, kiun la svisa registaro penegre starigis kun siaj EK- kaj ELKA-partneroj. Subite sekvis lasta vastega propaganda batalo de la kontraŭuloj kaj poruloj, kiu inundis la svisan gazetaron per miloj da alvokoj. La plimulto de la svisoj fidis la „ne“-alvokon: 1 786 121 homoj (aŭ 50,3 %) voĉdonis „kontraŭ“, 1 763 016 (aŭ 49,7 %) „por“ – diferenco de nur 23 105! 78,3 % de la voĉdonrajtaj civitanoj partoprenis la baloton, rekordo depost 1947. Sed pli impresa ol la popola „ne“ estis la negativa sinteno en la plimulto de la svisaj kantonoj. 18 el la 26 kantonoj ne konsentis.

Demografiaj abismoj

Escepte de la kantonoj Basel-urbo kaj Basel-kamparo ĉiuj germanlingvaj (alemanaj) kantonoj diris ne al EES. Same kondukis la itallingva kanto Tĉino (kiu timis ĉefe la invadon de laborfortoj el Italio) kaj Grizono, kie loĝas la plimulto de la retoromanĉoj. En la germanlingva parto de Svislando la nea procentaĵo estis do inter 51 % kaj 74 %. Tute inverse en la kazo de la franclingvaj (romandaj) kantonoj, kiuj kune voĉdonis klare por EES (inter 56 % kaj 80 % jes). Tial, la ĉagreno kaj seniluziigo en Romandio, kiu tradicie sentas sin pli ligita kun la ekstera mondo ol Alemanio, estis senlima. Krom la lingvoregiona abismo klare evidentiĝis ankaŭ la konfliktoj inter urbecaj kaj kamparaj regionoj, inter generacioj kaj antaŭ ĉio inter politikaj tavoloj kaj la popolamaso.

Ŝoko por ĉiuj

Ne nur ĉiuj „jes“-pledantoj estis ĉagrenigitaj pri la rezulto, sed ankaŭ multaj „ne“-voĉdonintoj estis iom ŝokitaj. Nun en la izoligema alpa respubliko multaj timas interne ankoraŭ pli grandan psikologian distancon inter Alemanio kaj Romandio kaj ekstere ekonomian kaj politikan izoligon en Eŭropo. En Bruselo oni jam komprenigis al la svisoj, ke EK ne pretas starigi apartan EES-kontrakton kun Svislando. Post la voĉdono, Berno sentis sin devigita rezigni pri la ELKA-prezido, kiun ĝi estus haviginta en la unua duono de 1993. Jen unua malagrabra sekvo por la landa politiko. Pluraj politikistoj parolis pri la „nigra 6a de decembro“. Ĉu la futuro de Helvetio sen EES ankaŭ estos nigra – nur la estonto mem alportos la respondon.

Andy E. KÜNZLI

NOV-ZELANDO

Al pli demokrata sistemo?

Per referendumo pasintjara la novzelandaj voĉdonantoj klare montris ke ili preferus pli demokratian balotan sistemon ol la nuna, simpla, kiun ili heredis de la britoj.

En 1986 reĝa komisiono, starigita de la tiama registaro, rekomendis, ke Nov-Zelando adoptu la miksitamembran proporcion (MMP) sistemon, similan al tiu de Germanio. La tiama registaro (de la laborista partio) promesis aranĝi referendumon pri la propono sed neniam faris. La nuna registaro (de la nacia partio) promesis same sed ellaboris por si metodon prokrasti ĝin kiel eble plej longe, ĉar ili plejparte ne deziras tian sistemon. Ĝis nun plej ofte elektiĝis nur membroj de la du ĉefaj partioj (laborista kaj nacia). Nur malofte membroj de aliaj partioj aŭ sendependuloj gajnis lokon en la parlamento.

La registaro decidis aranĝi du referendumojn, la jam menciitan kaj duan ĉi-jare. En la unua la voĉdonantoj devis montri (1) ĉu ili deziras la nunan sistemon aŭ ŝanĝon kaj (2) se la plimulto elektas ŝanĝon, kiun (el kvar listigitaj) ili preferas. La ĉefministro kaj aliaj politikistoj provis konvinki onin voĉdoni por la nuna sistemo dirante ke la MMP-sistemo donus nestabilajn registarojn.

En la referendumo de 1992 90 % el la voĉdonintoj elektis ŝanĝon kaj 70 % elektis la MMP-sistemon. Kelkaj politikistoj provis bagateli la rezultojn dirante, ke la popolo estas seniluziigita pro la politika situacio kaj malfidas politikistojn. Ili diris, ke la popolo volas puni la politikistojn pro la fakto, ke tiuj ne faris kion la popolo deziras. Tio ignoras la fakton, ke asocio por elektoreformo propagandis dum jaroj por alkitimigi la popolon pri la avantaĝoj de proporcia balotosistemo, kaj precipe pri MMP.

La registaro nun promesas, ke ili starigos parlamentan komitaton por ellabori la detalojn de la MMP-sistemo, supozeble laŭ la propono de la komisiono de 1986, kaj finfine prezentos leĝproponon. En la dua baloto la voĉdonantoj devos decidi ĉu tiu sistemo fariĝu leĝo en Nov-Zelando aŭ ne. Membroj de malgrandaj partioj nun timas, ke eble la du ĉefaj partioj kune elpensos kiel eble plej malbonan version de MMP por ke la voĉdonantoj decidu elekti daŭrigon de la nuna sistemo.

D. E. ROGERS

LA MONDO EN DECEMBRO 1992

- 1a. UN-rezolucio kondamnas la serbojn kiel ĉefagresantojn en Bosnio. El la militregiono multigigas raportoj pri sistemaj perfortoj de virinoj kaj pri koncentrejoj.
- 2a. Germana parlamento ratifas la kontrakton de Maastricht.
- 3a. Eksa GDR-ĉefo Honecker en proceso neas ĉian kulpon pri politikaj viktimoj.
- 3a. Nova leĝo permesas israelajn kontaktojn kun PLO-representantoj.
- 6a. Hinduoj detruas moskeon en Ayodhya kaj kaŭzas tumultojn en Hindio, Pakistano kaj Bangladeŝo.
- 6a. La svisa popolo voĉdonas kontraŭ la aliĝo al Eŭropa Ekonomia Sfero (EES).
- 7a. Prezidanto Kuĉan kaj liberaldemokratoj venkas en Slovenio.
- 8a. Jelcin nomumas la reformemulon Gaidar ĉefministro de Rusio.
- 9a. Armitaj UN-trupoj invadas Somalion por helpi al la malsatanta popolo.
- 10a. Portugala parlamento ratifas la kontrakton de Maastricht.
- 10a. Rigorberta Menĉu, defendantino de la indiĝenaj rajtoj en Gvatemalo, ricevas la Nobel-pacpremion.
- 10a. La germana registaro ekmalpermesas novnaziajn grupigojn reage al iliaj atakoj kontraŭ eksterlandanoj.
- 11a. Sukcesa konferenco de Eŭropa Komunumo en Edinburgo.
- 13a. La liĥtenŝtejna popolo voĉdonas por la aliĝo al Eŭropa Ekonomia Sfero (EES).
- 15a. Post solvo de la parlamenta krizo, la nova rusa ĉefministro Ĉernomirdin promesas daŭrigi reformojn kun modifoj.
- 17a. Reage al murdo de israela soldato fare de la radikala organizo Hamas, la jerusalema registaro deportas 400 palestinanojn al Libano.
- 19a. La nova prezidanto de Sud-Koreio nomiĝas Kim Jung Sam. Opoziciulo Kim Dae Jung fiaskas.
- 20a. Prezidanto de Serbio Miloŝeviĉ reelektita. Opozicia kandidato Paniĉ postulas nuligon de la manipulutaj elektoj.
- 20a. Unuafoje pluraj kandidatoj prezentas sin en komunumaj elektoj en Kubo.
- 30a. Brazila prezidanto Collor demisias sub premo de koruptada suspekto.

La „Irlandiĝo” de Eŭropo

Ĝis ĉi tiuj lastaj jardekoj de nia jar-milo, Irlando estis unu el la plej malgrandaj kaj malgravaj sendependaj landoj en Eŭropo. (Ni ne enkalkulu la ĉarmajn miniaturajn restaĵojn de mezepokaj regnetoj, Andoro, San-marino, Liĥtenŝtejno, ktp., kiuj apenaŭ estas naciaj ŝtatoj en la moderna senco.) Sed Irlando ne plu estos nano inter gigantoj. Grandaj regionoj de Eŭropo baldaŭ konsistos el arego da novaj (aŭ restarigitaj) „Irlandoj”.

Ni klarigu: escepte de la ses nordorientaj graflandoj (administrativaj distriktoj) sub brita regado – tiel nomata „Nord-Irlando” – la areo de la Irlanda Respubliko ampleksas 70 282 km² (la tuta insulo: 84 421 km²), kaj havas ĉirkaŭ 3 400 000 loĝantojn (Nord-Irlando ĉ. 1 500 000). Do, laŭ tersurfaco kaj/aŭ nombro da loĝantoj, Irlando – sen aŭ kun la norda parto – estas plimalpli same granda kiel Kartvelio, Azerbajĝano, Litovio, Ĉeĥio, ktp. Ĝi estas pli granda ol Albanio, Luksemburgo, Latvio, Moldavio, Armenio, Estonio. Tiel, en Eŭropo de proksima estonteco, Irlando estos kvazaŭ mezgranda aŭ averaĝa lando. Tamen, multaj homoj sendube demandos, ĉu la nove sendependaj landoj (eĉ la pli grandaj, kiel Ukrainio kaj Kazaĥio) havas sufiĉe fortan ekonomian bazon por pluvivi. Espereble, ili kunlaboros inter si, kaj interŝanĝos spertojn kaj varojn, sed la historio de Irlando sugestas, ke ilia vojo estos maltrankvila kaj malfacila.

Eble el la sperto – t.e. kaj sukcesoj kaj eraroj – tiuj „novaj” ŝtatoj povus lerni de la Irlanda Respubliko. Kompare kun ili, Irlando estas unu el la unuaj ekskoloniaj landoj, kiuj sendependiĝis post la dua mondmilito. La moderna Irlando estis kreita en 1921, kiam fondiĝis la libera ŝtato, en kiu la nord-irlandaj protestantoj decidis ne partopreni. Dum la dua mondmilito, la ŝtato restis neŭtrala, kvankam ankoraŭ malinklina ano de la Brita Regno. En 1949, la irlandaj registaro deklaris plenan sendependecon, renomante sian landon „Irlanda Respubliko”, kaj forlasante la britan regnon.

Ekde la naskiĝo de la libera ŝtato, la irlandaj popolo estis instigita de optimismo kaj de la idealoj de sia korigo kaj „patro de la ŝtato”, Éamon [Ejmon] de Valera. La antikva kelta idioma de Irlando, la gaela, iĝis unua

oficiala lingvo, kaj ĉie angleparolantaj irlandanoj komencis fervore lerni ĝin. Okazis nova renesanco de literaturo kaj de indiĝena kulturo. Metiĝis la fundamentoj de memstara ekonomio. Leĝoj pri propraĵo de la tero estis reformitaj. Estis kreita transport-sistemo, kiu inkludis fervojojn, aŭtobuso-servojn kaj pramsi-pojn, inter la ĉefinsulo kaj apudaj insuletoj. Aliaj gravaj ŝtataj entreprenoj kontribuis al la prospero de la lando: unu por ekspluati la abundajn torfejojn; alia por mastrumi produktadon de laktaĵoj; kreiĝis la nacia fluglinio *Aer Lingus*; ŝtata elektroprovizado; tutlandaj poŝtaj kaj telefonaj servoj; ŝtata produktado de sterko kaj kemiaĵoj; nacia komerca ŝipentrepreno, ktp.

Kvankam la ĝenerala vivnivelo de la popolo estis modesta – eĉ malriĉa – ĝi estis pli bona ol iam antaŭe en la longa historio de Irlando. Malgraŭ iuj iom premaj leĝoj (pri cenzuro, statuso de la katolika eklezio, i.a.), inspiritaj de la hierarkio de episkopoj, Irlando estis – krom dum civila milito, kiu finiĝis en 1923 – kontenta, trankvila lando.

Ege sukcesaj estis agrikulturaj kooperativoj, kaj kredit-unioj (speco de ŝparbank-similaj mutualaj societoj por laboristoj kaj malpli riĉaj homoj). Tamen, post la morto de prezidanto Éamon de Valera, la nacio rapide komencis forlasi kaj forgesi siajn idealojn kaj lian revon pri nova libera socio, kun propra kulturo kaj memstara ekonomio. Sinsekvaj landaj registaroj preferis allogi eksterlandajn investantojn, kaj multaj el tiuj profitis la okazon ekspluati avantaĝajn privilegiojn proponitajn de la ŝtata industria instanco.

Ĉu Irlando ruiniĝas?

Dum kelkaj jaroj post aliĝo al la Eŭropa Komunumo, Irlando ĝuis mallongan favoran konjunkturon, sed profitis precipe la riĉaj farmistoj kaj financistoj – multe malpli, aŭ tute ne, la ordinara popolo. La registaro decidis imiti la privatigan politikon de la tiama brita ĉefministro Thatcher. Ankoraŭ pretendante esti fidelaj heredantoj de de Valera, la regantaj politikistoj hodiaŭ malmuntas la socialan kaj ekonomian sistemojn, kiujn la estinta prezidanto konstruis. Preskaŭ ĉiu elemento de la nacia ekonomio kaj de la sociala strukturo devas iĝi privata kaj profitdona. La rezulto estas rapida kolapso de la tuta sociala konstruaĵo: senprecedenca senlaboreco, kaj iompostioma ruiniĝo de industrio, agrikulturo, kolektiva transporto kaj publikaj servoj. Samtempe, la riĉuloj restas riĉuloj. Kompreneble, la internacia

ekonomia depresio estas aldona faktoro, sed la registaro mem estas ĉefa kulpulo.

Oni rajtas dubi, ĉu tia „irlandiĝo”, inter alie de la sendependiĝintaj respublikoj de la eksa sovetia bloko, kaj aliaj nove fonditaj ŝtatoj, en aliaj partoj de la mondo, estas dezirinda estonteco.

Dume, en Irlando multaj demandas sin: „Kio okazis kun nia revo?”...

Garvan MAKAJ'

La verda insulo ruĝiĝas

Ekde la fino de la postsendependiĝa civilmilito (1923) en Irlando, la ŝtato ĉiam estis regata aŭ de unu el la du dekstraj partioj, kiuj reprezentas la du batalintajn flankojn en tiu enlanda milito, aŭ de koalicioj, en kiuj la plej forta partnero estis unu el tiuj partioj. En la lasta nacia elekto de novembro 1992, la tiama majoritata partio FF (respublika) denove ricevis la plimulton da voĉoj, sed unuafoje en la historio de la moderna nacio, ankaŭ multaj kandidatoj de la (maldekstra) labor-partio estis elektitaj en preskaŭ ĉiu elektodistrikto. En Dublin – eĉ en la burĝaj kaj relative riĉaj distriktoj – la plimulto de la sukcesaj kandidatoj estis laborpartianoj. Sekve, la plej granda parto de la elektomapo de la ĉefurbo nun montriĝas solide kaj seninterrompe ruĝa. Tamen, ĉar neniu partio ĝuas la absolutan plimulton, ĉi-jare Irlando havos refoje koalician registaron, en kiu la labor-partianoj estos gravaj partoprenantoj. Inter la novaj parlamentanoj troviĝas unuafoje hind-devena kuracisto el Afriko. La sola kandidato kiu parolas Esperanton (ano de la verda partio) ne ricevis sufiĉe da voĉoj por esti elektita.

Girvan MacKAY



Irlanda prezidantino Robinson regas super la ruĝa insulo

Liberon oni gajnas, ne ricevas donace

Adem Demaçi el Kosovo, laŭreato de la Saĥarov-premio, estis intervjuata por MONATO de Bardhyl Mežini.

MONATO: Sinjoro Demaçi, vi suferis ĉ. 30 jarojn en prizonoj de eksa Jugoslavio kaj nun estras konsilistaron por la protekto de la homaj rajtoj en Kosovo. Kio ŝanĝiĝis?

DEMAČI: La homaj rajtoj en Kosovo ne estas simple premataj per piedoj, sed komplete neataj. La albanojn oni eksigis el la provincaj konstitucio kaj leĝaro. Por ili ekzistas nek fizika, nek jura sekureco. Al ili mankas ajna plendeblo, apelacieblo. Malgraŭ tio, nia konsilistaro klopodas kolekti kaj evidentigi ĉiujn faktojn de neado de la homaj rajtoj.

MONATO: Kiaj estas la plej gravaj malrespektoj de la homaj rajtoj?

DEMAČI: Al la albanoj oni neas la rajton kleriĝi (ĉiuj mezlernejoj kaj altlernejoj estas fermitaj, dum la elementaj duone funkcias). En plimulto de kuracejoj oni senlaborigis ĉiujn albanajn medicinistojn, dum en entreprenoj kaj administrejoj oni perforte forpelis pli ol 100 000 personojn albandevenajn, t.e. preskaŭ tri kvaronojn de la tuta laboristaro kaj oficistaro. La tuta administra reto restis en la manoj de slavoj, precipe serboj, kiuj konsistigas juĝeojn, prokurorojn kaj policon. Ankaŭ radio kaj televido ne plu parolas albanlingve. La sola ĉiutaga ĵurnalo *Rilindja* ĉesis aperi en junio 1990¹. Ĉiutage oni pafas, mortigas, perfortas, rabas ne nur individuojn, sed tutajn vilaĝojn, kvartalojn. La lasta murdo okazis al la junulo Nusjet Shukri [Ŝukri] Selimi el Preŝevo, ĉar li atakis gvardistojn en la centro de Priŝtina, ĉefurbo de Kosovo. La ekonomia situacio estas katastrofa. La polico serĉadas albanajn junulojn por varbi ilin al la armeo militanta en Bosnio. Tial, multaj gejunuloj fuĝas al okcidenta Eŭropo. Tiamaniere la serboj sukcesas „etne purigi” eĉ parton de Kosovo, forpelante de ĝi ĉ. 200 000 albanojn.

MONATO: La serboj asertas, ke Kosovo estas la lulilo de Serbio. Kiel vi komentis tiun ĉi tezon?

DEMAČI: Tio estas nura trompaĵo. Ankaŭ la serba historiografio mem notas, ke la serboj venis en Kosovon nur en la 7a jarcento, dum oni ankoraŭ ne konas la ekzaktan daton de la albana alveno. Simple, la alba-



noj kaj grekoj estas ŝajne la plej malnovaj popoloj de nia kontinento. Tial loĝi en Kosovo estas historia rajto por la albanoj. La fakta rajto plie pravigas la kontraŭan tezon. Albanoj loĝintaj kaj loĝantaj en tiu regiono estis ĉiam plimulto – nun 90 %. Jam la kodekso de eksreĝo de Serbio Stefan Duŝan konfirmis: Reĝlando de serboj, grekoj, bulgarioj, makedonoj kaj albanoj (ŝĉiptaroj)².

MONATO: La gazetaro informas pri la intenco de la serboj kolonii Kosovon. Kiel statas la vera problemo?

DEMAČI: Tute prave. Serbio malnova, same eksa Jugoslavio (dua kaj nun tria, eta), neniam akceptis la albanan etnan karakteron de Kosovo, de parto de Montenegro, suda Serbio kaj okcidenta Makedonio. La koloniada politiko de Serbio komenciĝis en 1875, okaze de la rusa-otomana milito. Ĝis 1881 la serboj sukcesis serbigi loĝantaron de ĉ. 600 vilaĝoj, kie albanoj plimultis kaj ne hezitis apliki perforton. Oni buĉadis homojn, infanojn, bruligis tutajn familiojn en siaj domoj. Tiel, centmiloj da homoj fuĝis al Kosovo kaj aliloken. Tiam saman politikon Serbio daŭrigis depost 1937. Tiam la konata serba historiisto kaj poste akademiano Vaso Cubriloviĉ kompilis programacon por transloki la albanojn. Sub tiu premo en la periodo 1945-67 transloĝiĝis al Turkio kaj alilande pli ol 200 000 albanoj. Nuntempe, pro la milito en Bosnio, Hercegovino kaj Kroatio oni fuĝigis al Kosovo milojn da serboj, kiuj okupas la vivejojn de la albanoj.

MONATO: Kiun rolon nun ludas politikaj partioj en Kosovo?

DEMAČI: Ili estas nur fasado serve al la serboj por prui antaŭ Eŭropo demokration en Kosovo. Fakte, tiuj partioj estas senpotencaj, senmonaj. Ili ankaŭ ne rajtas aranĝi liberajn balotojn, oni ne permesas al ili kolekti helpaĵojn. Ili ne estas decidpovaj. La 2an de junio 1990, la albana eksparlamento aperigis Deklaracion pri Suvereneco de Kosovo, la 2an de septembro 1990 estis aprobita la konstitucio de Respubliko Kosovo, la 26-30ajn de septembro 1991 oni lanĉis referendumon pri sendependa Kosovo, kaj la 24an de majo 1992 oni elektis novan demokratian parlamenton kaj prezidanton de respubliko, Ibrahim Rugova. La albanaj partioj kaj partiestroj en Kosovo deklaras, ke ili apogas sendependan, neŭtralan ŝtaton malfermitan al la mondo, precipe al Serbio kaj Albanio.

MONATO: Finfine, kion vi opinias pri la eblo de militeksplodo en Kosovo?

DEMAČI: Miaopinie la ebloj estas 50 %. La serboj ne kompatas la albanojn, ĉar ili eĉ ne kompatas slavojn en Kroatio kaj Bosnio. Sed ilin interesus Kosovo sieĝata, terorigata kaj Albanio malriĉa, malforta. Aliflanke, neniu en Eŭropo riskas involvi sin en militon favore al la albanoj. Tial, la albanoj devas mem batali por sia libero, ĉar liberon oni devas gajni, ne atendi ĝin kvazaŭ donaco.

Bardhyl MEZINI

1. Post ĝia malpermeso en Kosovo, la gazeton intertempe revivigis ekzilalbanoj en Svislando, kie ĝi nun regule aperas.
2. De la albana etnonimo *shqiptar*. Aliaj lingvoj, kiel ekzemple la germana, uzas *skipetaro*. (red.)

Judoj cedu kaj paciĝu kun araboj!

Oni rakontas, ke la fruaj hebreoj unuafoje aperis en la historio kiel sklavoj, kaj ke Moseo estis libermensa egipta generalo, kiu ribelis kontraŭ sia propra dio-reĝo, la faraono. Li kolektis la sklavojn kaj komencis kune kun ili vagadi orienten tra la dezerto. De tie ili invadis la indiĝenan popolon de Palestino (la Kanaano-idaron), kiu dum miloj da jaroj estis loĝanta en tiu hejmlando. Post longa sanga rezisto fare de la loka popolo, la hebreoj povis okupi militan bazon, kaj „sovaĝa popolo estis regata de sovaĝaj reĝoj” (H.G. Wells). Tio poste kondukis al ilia kaptiteco en Babilono...

Oni konfesu tamen, ke la unua krimo en la komenco de la homara historio estis la sklaveco. Multaj popoloj suferadis pro tiu kruela ekonomia sistemo.

Se la israelanoj deziras pacon – kaj certe ili deziras – tiuokaze ili devas provi liberiĝi de la ĉenoj de siaj „amikoj” en Okcidento. Ŝajnas, ke ili ne povas fari tion. Ekde la establo de ilia ŝtato en 1948, Okcidento uzas kaj misuzas ilin kontraŭ la araboj.

La estonta paco restas ege dezirinda kaj nepre necesa projekto kaj por la proksim-orienta regiono kaj por la tuta mondo. Tio tamen plenumiĝos nur, se oni ekkonscias pri jeno:

1) Nuligo de tia falsa promeso, ke „La Eternulo” donacis la prosperan landon de Kanaano al la hebreoj kaj ties idoj. La judoj konfesu, ke ili estas samegalaj homoj sen iuj ajn diaj aŭ aliaj privilegioj. Argumentoj: a) ĉar tiu promeso kaŭzas daŭrajn konfliktojn inter la diversaj popoloj en tiu regiono; b) ĉar la plimulto de tiuj, kiuj nomas sin judoj, origine ne devenas de Palestino, sed el eŭropaj kaj aliaj landoj; c) ĉar la plimulto de la judoj estas ateistoj kaj sekvantoj de Marx, Freud, ktp.

2) Nuna Israelo klopodu integriĝi en la regiono, a) per propra distanciĝo disde la politiko de tiuj eksterlandaj potencoj, kiuj kutime profitas de la malpaco en tiu regiono (nome Usono kaj ties aliancanoj); b) per reciproka kompensado al ĉiuj viktimoj de la konflikto ekde la fondo de la israela ŝtato; c) per helpo al la palestina popolo krei ties propran ŝtaton sur ĝia origina teritorio, Palestino, konforme al pluraj UN-rezolucioj; ĉ) per limigo de la juda enmigrado en Israelon; d) per formado de federacia aranĝo inter

ĉiuj ŝtatoj de la regiono cele al fruktdona kaj paca kunlaboro. Araboj kaj judoj denove formu internacian spiritan kaj civilizan potencon por rekonstrui la mondon baze de spiritaj principoj de paco, egaleco kaj justeco por ĉiuj nacioj kaj homoj.


3) Estas Okcidento mem, kies civilizo diversmaniere detruas la mondon, kaj estas ĝuste ĝi, kiu malhelpas pacon speciale en tiu parto de la mondo.

4) La judoj akceptu siajn diversajn ĝisnunajn patrujojn (Rusion, Afrikon, Arabion, ktp.) kiel siajn konstantajn

hejmlandojn kaj restu tie fidelaj kaj egalrajtaj civitanoj.

5) Fine oni povas senkaŝe aserti, ke Okcidento neniam estis, nek estas vera amiko de la judoj. Ĝi nur uzas ilin „por la malpura laboro” kontraŭ araboj kaj aliaj. Estas dubinde, ĉu en kazo de estonta danĝero por la judoj Okcidento estus lojala defendanto de iliaj interesoj. Do, estus en la intereso de la judoj mem konkrete paciĝi kun siaj najbaroj per monstro de bonaj agoj anstataŭ la nuna agresemo.

Id. Al-AMILY, Britio



La israela ĉef-ministro Rabin (maldekstre) kaj egipta prezidanto Mubarak (dekstre) manpremas.



Fundament-juda israelano antaŭ balotafiŝo de rabeno Yitzhak Peretz de la Unuiĝinta Thora-partio.

ITALIO

Amuzaj eraroj, maldolĉaj veroj

Modo en Italio estas libroj pri eraroj de lernejoj. La iniciatinto de tiu ondo estis Marcello [Marĉelo] D'Orta, instruisto ĉe unuagrada lernejo, kiu publikigis la unuan – kaj eble la plej interesan – kolekton.

Jen ekzemple unu el la rezultoj de lerneja verkada tasko, kies titolo estis: „En kiu epoko vi dezirus vivi?” Skribis iu knabo: „Mi volus vivadi en la prahistoria epoko, por interbatali. Tiutempe fakte oni faris multon da luktoj. La armilo estis klabo. Estis ĉiam malbona vetero. La familioj kvereladis, kaj ĉiuj estis malpuraj. Ili ne lavis sin, ne sin kombis, nek sin razis la barbon; ne eĉ la virinoj. La infanoj, tuj kiam ili naskiĝis, estis jam prahomoj. La homo tiutempe ekis inteligentiĝi, sed similis ankoraŭ al simioj; ili fariĝis egiptoj, sed ĉi tio estas alia ĉapitro.”

„Estante koloraj, tre viglaj, ofte ege

kontraŭgramatikaj,” diras Marcello D'Orta: „tiuj ĉi taskoj povas unuavide ŝajni kolekto da ‚komikaj eraroj’. Tamen, estas ia saĝeco kaj antikva rezigno, ia ĝojo nekonvencia kaj melankolia en sia simpleco, ia ĉiutaga kroniko gaja kaj kruela, kiu enfluas en bildon malkvietigan pri la vivostato en suda Italio.”

En la tasko „Priskribu vian hejmon”, aperis jena komunikilo: „Mia hejmo estas tute kaduka. Tamen ni tie vivadas, ĉar ĝi estas mia hejmo, kaj ni ne havas monon. Mia patrino ĉiam diras, ke la tria mondo ne posedas eĉ hejmon kadukan, kaj tial ni ne rajtas plendi. La tria mondo estas ege pli tria ol ni!”

Libroj fare de infanoj. Librojn plenajn je eraroj, kiuj ridetigas. Sed plenaj ankaŭ je veroj, kiuj lasas la buŝon maldolĉa...

Gianfranco CAZZARO

INTERNACIISMO

Baltaj birdoj surletere

Fine de 1992 kvar landoj ambaŭflanke de la Balta Maro – Svedio, Estonio, Latvio kaj Litovio – faris komunan eldonon de poŝtmarkoj. Temas pri markoj kun bildoj pri kvar birdoj



troveblaj ĉirkaŭ la Balta Maro, kaj la samaj aperis en ĉiuj kvar landoj. La birdoj estas fiŝaglo, nigravosta limozo, granda merĝo kaj tadorno, do birdoj iel ligitaj al akvo.

La valoroj de la markoj estas en Svedio 4,50 kronoj, en Estonio 1 krono, en Latvio 5,00 – valuto ne specifita, pro eventuala valuta reformo, kaj en Litovio ‚B’ – valuto ne specifita, same pro atendata valuta reformo.

Per tiu internacia kunlaboro oni volas substreki, ke protektado de faŭno kaj medio estas internacia respondeco, precipe en la baltmara regiono. La Balta Maro estas la plej granda saleta maro de la mondo kun multaj unikaj trajtoj kaj unikaj problemoj. Inter tiuj estas ankaŭ la fakto, ke ĝin ĉirkaŭas ne malpli ol naŭ sendependaj ŝtatoj, kies decidoj influas la medion unuj de la aliaj.

Sten JOHANSSON



Ekde novembro 1992 aŭtomobilistoj, celantaj la antikvan centron de la litova ĉefurbo Vilnius, devos inter la 8a kaj 20a horoj pagi imposton. La unufoje pagota normala enirbileto egalas al triono de minimuma hora salajro. Por loĝantoj aŭ por garaĝistoj, la enirbileto kostas kvinfoje malpli. Por busoj kaj ŝarĝaŭtoj la prezo male estas trioble pli alta ol la normala. La antikva parto de Vilnius enhavas grandan varion de arkitekturaj stiloj. Pro la trafiko, muroj kaj pordegoj de antikvaĵoj komencas difektiĝi. Ne sufiĉas mono por renovigo de la valoraj konstruaĵoj. Impostado de la trafiko iom pliriĉigos urban buĝeton kaj malgrandigos trafikan fluon en la urbocentro.

Laimius STRAŽNICKAS

Mizera hom-trafiko

Preskaŭ ĉiutage televide aŭ ĵurnalo-fote, eblas lastatempe en Hispanio rekoni la senesperajn vizaĝojn de homoj kaptitaj de polico pro neleĝa elboatiĝo. Ili estas homoj venintaj de Afriko eŭropen, en vana serĉo de esperplena paradizo. Nek kreditkartojn nek vilaon sur suna marbordo ili posedas...

Neleĝa hommigrado el Afriko laŭlonge de sud-hispana marbordo komencas preni akran karakteron. Trans Mediteraneon ili vojaĝas, dudek- aŭ tridek-ope, en malfortikaj fiŝboatoj ne adaptitaj al transporto de multaj homoj, salaj amasĉerkoj kie ili ofte trovas sian finon.

Malantaŭ ili restas Somalio, Etiopio, aŭ Liberio, hejmlando kiun ili forlasis por entrepreni novan ekziston en „ĉiopova kaj bonhava nordo”. Sed tie ilin atendas arestejo, kaŝa dungado kontraŭ ridinda salajro, mizer-ega vagado, pereco...

Neniu akceptas respondecon pri la finegoco. Ĉe unu kaj alia flanko de la maro, la fiŝkaptistoj neas ian ajn rilaton al tiu ŝakrado per homoj. Sed ne estas malfacile konkludi, ke tio ja helpas ilian embarasan vivtenadon, ĉar ili ne estas multe malpli mizeraj ol la enmigrintoj mem. La faktoj elokventas: pasintan septembron la hispana polico kaptis, por la unua fojo, du marokajn fiŝboatistojn, kiuj sin dediĉis al la neleĝa homtrafiko.

La komerco verŝajne ne finiĝas surtere. Pluraj enmigrintoj deklaris al asocio por rifuĝintoj, ke ofte sin prezentas taksiistoj por ilin veturigi trans Andaluzion aŭ en Portugalion kontraŭ astronomiaj sumoj (oni scias, ke ili kunportas sian tutan monon).

Jen do plia honto inter nordo kaj sudo, kiu igas nin proklami la nepran neceson vere kaj definitive estigi *homan* ekologion. Tion bezonas niaj afrikaj fratoj.

Alberto FRANCO

VALUTO

Oero ne el oro

El la vorto oro oni antaŭ jarmilo kreis la skandinavan moneron oero (*öre, øre*). Pro inflacio jam delonge ne videblas ligo inter oro kaj oero. Iom post iom arkaikiĝis la unu-, du- kaj kvin-oeroj, per kiuj oni infanaĝe havigis dolĉaĵojn. Nun nevalidiĝis eĉ la dek-oero tiel ke restas nur kvindek-oero.

Ĉe la najbaraj danoj ankoraŭ restas dudek-kvin-oeroj – ĝis kiam? (Tiu monero tamen perdis sian pitoreskan mezan truon, kiu transsaltis al la kvin-krono!)

Lastatempe produktado de unu sveda dek-oero kostis dudek oerojn. Do, ne mirinde ke la Regna Banko en ĉi-tempo de valuta malkvieto kaj ŝtatbuĝeta deficitado decidis ĉesigi tiun produktadon. Nun oni kolektas la malnovajn monerojn por ilin eksporti. Ĉu eksporti dek-oerojn? Nu, ne kiel monerojn, sed kiel fanditan alojon el nikelo kaj kupro. Kaj kial ne mem uzi ilin por produktado de kronoj? En Svedio oni lastatempe emas trovi aliajn alojojn, sennikelajn, pro la kreskanta nombro de homoj suferantaj pro nikel-alergio. Ĝis nun restas nur unu tia sennikela monero, la orkolora dek-krono. Sed la 50-oero, kiu ekde nun estas la plej malgranda monero de Svedio, baldaŭ aperos en nova vesto pli malgranda, kuprokolora kaj sennikela.

Entute la sveda Regna Banko dum cent dudek jaroj stampis 2,2 miliardojn da dek-oeroj. La plimulto tamen jam delonge malaperis. Oni sukcesos kolekti nur proksimume 300 milionojn. Dek oeroj valoras du usonajn aŭ tri nederlandajn cendojn.

Sten JOHANSSON

INTERNACIISMO

Paneŭropo: Ĉu „Granda Germanio”?

Novaj rondoj de Paneŭropa-Unio fondiĝas en la postkomunismaj landoj, ankaŭ en Pollando: la unua en la silezia urbo Racibórz [Raĉibuŝ], la sekva en Gdańsk [Gdajnsk].

La Paneŭropa-Unio fondiĝis tuj post la unua mondmilito. Ĝia iniciatinto kaj la ĉefa ideologo estis la grafo Rikardo Coudenhove-Kalergi [Kudenhofe] — eminenta membro de viena framasona loĝio. La celo de Paneŭropa-Unio estas la neniigo de ekonomiaj, naciaj kaj politikaj limoj kaj kreo de unu ŝtato kaj unu nacio. Unu el la paneŭropaj sloganoj estas: „Eŭropo nur por eŭropanoj!”

La prezidanto de la gdanska Paneŭropa-Unio estas Wojciech Bonisławski [Vojĉjeŝ Bonisŭafski], kaj la estro de ĝia programa konsilantaro pastro Henryk Jankowski [Henrik Jankofski] — konata kiel la animzorganto de la sindikato Solidareco. Pastro Jankowski strebas, ke Sankta Brigita estu proklamita la patronino de la Paneŭropa-Unio. Li revas ankaŭ pri tio, ke la preĝejo de Sank-

ta Brigita en Gdańsk, kiun li estras, estiĝu la ĉefa sanktuaro de la venonta monda respubliko.

En la postkomunismaj landoj la fondiĝon de paneŭropaj rondoj iniciatas la lokaj komunumoj de la germana nacimalplimulto, lanĉante sloganon: „Unuigita Germanio en Unuigita Eŭropo”. Laŭ tiu ideo estas planata fondiĝo de paneŭropaj rondoj ekzemple en orienta Brandenburgio, orienta kaj okcidenta Prusio, Pomorano kaj en aliaj teritorioj, kiuj en la 19a jarcento apartenis al Germanio kaj nun al Pollando. Multaj poloj timas, ke per tia agado Paneŭropa-Unio pacmaniere fariĝos la Granda Germanio, al kiu milite strebis la Bismarck, Hitler kaj aliaj. Tiun ideon la poloj ofte nomas „Eŭropa komunumo de la germana nacio”.

Estus certe tre interese scii, kiel funkcias kaj agas la paneŭropaj rondoj en aliaj landoj. Ĉu en ili troviĝas ankaŭ esperantistoj? Eble estas iuj Esperanto-rondoj de Paneŭropa-Unio. Bonvolu min sciigi pri tio.

Andreo MARSZAŁKOWSKI

BRITIO

Murdo – per aidoso

Kio okazas, kiam portanto de homa imundeficita viruso (HIV), kredeble intence, pro venĝo, infektas sanajn homojn cele al disvastigo de aidoso? Alivorte: kiam mortis homo tiel infektita, ĉu viruson oni povas klasifiki kiel murdilon? Jen demandoj, pri kiuj juristoj en Britio rompas al si la kapojn – demandoj, kiuj ankoraŭ atendas neambiguajn respondojn.

Prezentiĝis tia neantaŭvidita kazo, kiam en mez-angla urbo Birminghamo 24jaraĝa, imunmalsana viro seksumis kun kvar virinoj por – laŭ akuzintoj – al ili transdoni la viruson. Temis ŝajneble – kvankam la viro forte neis ĉian kulpon – pri venĝo-atako kontraŭ socio: la viro ja kompatinda infektis per imundeficita viruso dum operacio, kiam ĥirurgo fuŝe infuzis al li difektitan, HIV-enhavantan sangon. Por sin venĝi, la infektito decidis suferigi, al eventuala morto kondamni aliajn, same kiel li mem suferas. Rivelis la bizara, tragika afero, nur post kiam unu el la virinoj mortis pro aidoso kaj la tri aliaj grave malsaniĝis.

Do... murdo per aidoso. Aŭ ĉu? Laŭ britaj leĝoj, pri murdo aŭ mortigo temas, nur se forpasis la viktimo ene de unu jaro kaj unu tago post la dato, la horo eĉ, de la atako. Tamen aidoso-viktimoj mortas ĝenerale ek-

ster tiu tempolimo – kaj kiel pruvi, kiam precize okazis la „atako“?

Ekster la tempolimo ja eblas procesi kontraŭ akuzito, sed nur surbaze de leĝoj pritraktantaj krimojn malpli gravajn, ekz. vundadon anstataŭ murdo. Denove leviĝas problemoj: kiel montri post tia longa tempo, ke ĝuste la akuzito infektis la viktimon... ja evidente mankas atestintoj. Iuj juristoj kredas, ke laŭ la nuna, lukohavanta stato de la brita leĝaro la nura solvo kuŝas en tio, ke oni deklaru la akuziton mense malsana kaj lin enhospitaligu – sed ĉu tiel „puni“ imunmalsanulon alfrontanta al necerta estonto?

Plej verŝajne en Britio baldaŭ enstatutiĝos nova krimo: murdo per aido-so. Dubindas, tamen, ĉu la nova leĝaro preventus kazojn similajn al tiu en Birminghamo: kiel atentigis kuracisto, multe pli efika ol leĝaro estus kondomo.

Paŭlo GUBBINS

INTERNACIAJ RILATOJ

Tradukista centro en Skotlando

Per la falo de la berlina muro, kaj la forrustado de la t.n. „fera kurteno“, ŝanĝiĝis la situacio ne nur en centra Eŭropo, sed ankaŭ ĉirkaŭ Balta Maro.


Ekzemple, la sveda insulo Gotlando, meze de Balta Maro, nun eble reprenos iaman mezepokan rolon; tiutempe ĝi ja estis centro de la hanso – komerca asocio de negocistoj kaj negocurboj.

Lastatempe, la komunika reto de Gotlando ĉefe etendis sin okcidenten, sed ĉi-somere ŝip-trafiko komenciĝis al Saaremaa, la plej granda insulo de Estonio, kaj ankaŭ al Ventspils en Latvio, kvankam (laŭ la kapitanoj de tiuj ŝipoj) la havenaj kotizoj de Latvio estas mortige altaj.

La kontaktoj daŭre evoluas. Laŭ iniciato de sveda verkisto, Clas Engström, oni komencis plani tradukistan centron por la baltmara regiono en Visby, sur la insulo Gotlando. En julio partoprenis konferencon en Visby ĉirkaŭ 30 tradukistoj kaj verkistoj el Svedio, Danio, Norvegio, Finnlando, Ruslando, Estonio, Latvio, Litovio, Pollando kaj Germanio. Ĉeestis la prezidanto de la sveda verkista asocio, Peter Curman, laŭ kiu la nova centro estos kunvenejo ne nur por tradukistoj, sed ankaŭ por beletristoj, eldonistoj kaj kultur-jornalistoj. La sveda ŝtato parte financos la centron kaj kunlaboros

kun la (ankaŭ nova) altlernejo de Visby. Laŭ Curman la tradukista centro kunigos dek unu lingvojn. Verŝajne li pensas pri la ŝtataj lingvoj de la dek landoj de la regiono, plus ankoraŭ unu, eble la samea. Bezonataj tamen estos kvin pliaj lingvoj: la gotlanda (kiu estas loka lingvo de la gastiganta insulo), la malaltgermana (iama ĉefa laborlingvo de la hanso), la jida, la sorba (slava lingvo parolata en orienta Germanio), kaj (eble) iu stranga internacia lingvo publikigita en urbo apud iu rivero elfluanta en la baltan maron...

Gunnar GÄLLMO



En oktobro Ukrainio unuafoje honorigis la soldatojn de la Ukraina Ribela Armeo, kiu estis fondita antaŭ 50 jaroj en la ukrainia nord-okcidenta provinco Volinio, por batali kontraŭ la „bruna pesto“ kaj kontraŭ „ruĝa“ bolŝevisma konkero. Pro la lasta fakto eĉ nura mencio pri tiu heroo paĝo el la ukrainia historio estis malpermesita, kaj eĉ severe punata. La „socialisma sistemo“ de Sovetio ja oficiale neniam estis malamika al Ukrainio, sed male „alportis al ĉiuj popoloj nur liberon kaj feliĉon“... En la mondo aktivas multaj organizaĵoj de eksaj kunbatalintoj de la URA, kiujn oni fondis ĉie kie iom dense ekloĝis ukrainianoj – ĉie, nur ne en la propra lando. Kaj jen, pro sendependiĝo de la patrolando, ili povis alflugi al la iama kara nesto.

Araneo

Denove helikopteroj

Rusio, kiel ankaŭ aliaj landoj de eksa Sovetio, baraktadas en ekonomia embaraso. Do, oni diris, ke uzinoj, iam produktintaj raketojn kaj tankojn, ekde nun produktu kruĉojn, tekdronojn, gladilojn kaj mekanikajn viandmuelilojn.

Tiu politiko alportis grandan malutilon al nacia ekonomio kaj ankaŭ al pormilita industrio, kies parto en industria potencialo de la lando (temas pri tuta Sovetio) atingis foje 80 ĝis 90 %. Tamen, por ke ne perdiĝu la valorega potencialo de la aviadilindustrio, oni decidis pli ol duobligi la produktadon de civila aviadtekniko kaj aperigi aviadilojn sur (aŭ super) la nivelo de mondaj normoj.

Sekve oni aranĝis kunlaboron kun aviadil-firmoj en Francio, Usono kaj aliaj landoj. Oni atendas, ke profitos ambaŭ flankoj: rusaj konstruistoj en kampo de plej nova teknologio kaj investado, la partneroj pro novaj ideoj de la inventemaj rusoj. Ekzemple, oni scias, ke ekis komuna programo pri ellaboro kaj produktado de perfekta aviadilmotoro, inter franca (SNECMA) kaj rusa (PERMA) entreprenegoj. Same, francoj kaj rusoj kunlaboras pri civilaj helikopteroj, dum rusoj kaj usonanoj pri avangarda milita helikoptero; la t.n. Ka-50, kromnomata „Fantomo”. Ĝi estas la unua kontrakto tiaspeca inter ambaŭ landoj, antaŭe disigitaj per la „malvarma milito”. Tiun ĉi sturmhelikopteron kapablos piloti nur unusola homo, ĉar ĝi estos abunde ekipita per rafinitaj elektronikaj aparatoj, ebligante „steliran” flugadon preskaŭ ternivele sen danĝero pri puŝiĝo kontraŭ surteraj objektoj.

Oni konjektas, ke la usona partnero provizos la armilaron kaj la sistemojn por stirado kaj komunikado.

NikSt

LITOVIO

Humanismo honorita

Monumento, simbolanta heroaĵon de japana konsulo Chiune Sugihara, estas starigita en Vilnius, la ĉefurbo de Litovio.

Lia heroaĵo okazis en 1939, kiam Germanio okupis Pollandon. Tiam rifugantoj amase fluegis en Litovion. Plimulto el ili estis judoj. Ili turnis sin al ambasadoj, petante elirvizojn. Japanio estis aliancano de Germanio,

kaj Chiune Sugihara devis obei la direktivojn de sia registaro. Tamen, li decidis ke humanismo pli gravas ol devo kaj li mem dum kelkaj monatoj elskribis pli ol 6000 viziojn. Per tiu konduto li kontraŭstaris ne nur al la oficiala politiko de sia lando, sed ankaŭ al la tradicio: senkondiĉe obei al la imperiestro. Pro tio en 1947 Chiune Sugihara estis eksigita el diplomata posteno. Poste li laboris en komerca firmao.

En oktobro 1991, la japana vicministro pri eksterlandaj aferoj, vizitonte Litovion por tie rekonstrui diplomatajn rilatojn, vizitis la familion de Sugihara kaj je nomo de sia ministrejo pardonpetis pro la kaŭzitaj afliktoj. Bedaŭrinde, Sugihara jam ne estis. Li forpasis en 1986.

La magistrato de Vilnius donis lian nomon al nova strato de la ĉefurbo kaj en julio alvenis tie la vidvino de Chiune Sugihara kaj la bofilino. Ili vizitis la superan konsilion, kie ilin akceptis prezidanto Vytautas [Vitaŭtas] Landsbergis.

Antanas KRENCEVIČIUS

KRIMO

Fraŭdo-furoro

Kun jara spezo de 14 miliardoj da britaj pundoj krimo okupas kvaran lokon inter la plej grandaj industrioj en Britio. Nur nafto-gigantoj BP kaj Shell [Ŝel] kaj kemio-imperio Unilever laŭspeze superas britan krimo-industrion, laŭ plejlastaj statistikoj diversfonte kompilitaj de la brita ĵurnalo *The Guardian* (La Gardisto).

Duoble pli da homoj – 420 000 – sin vivtenas en Britio per krimo (ĉu krimante, ĉu kontraŭkrimante, ekz. policistoj, juĝistoj) ol per iame tradicia brita tekso-industrio. Elektro-, gaskaj akvo-industrioj okupas nur 408 000 homojn, kaj – komparocelo – financa sektoro 585 000. Kalkulite estas, ke en Britio troviĝas almenaŭ 50 krimo-magnatoj jare lukrante pli ol milionon da pundoj. Centoj da aliaj milionuliĝis post sukcesaj krimokarieroj.

Ĉefa kialo de la nuna krimo-ondo (ekde 1979, dum ofico-periodo de la konservativa registaro, plialtiĝis krimo-kvoto je 32 %) estas kreskanta senlaboreco kaŭzita de obstina, nevenkebla recesio. Plej popularaj krimoj, tuŝantaj ĉiujn sociajn tavolojn, koncernas dom- kaj aŭto-priŝtelon, tamen pli insidaj – kaj pli profitodonaj – estas drogaĉoj kaj fraŭdo. Ĉi-lasto, precipe, furoras en Britio: krimuloj fariĝas pli kaj pli ruzaj kaj scias, ekzemple, kiel trompi la Eŭro-

pan Komunumon kaj akiri al si Bruselo-subvenciojn cele al kreo de ombro- aŭ fantomo-entreprenoj. Same prifraŭditaj estas asekurkompanioj: dum recesio pli facilas incendi fabrikon ol tie produkti varojn nevendebajn.

Tajloro krimis, botisto pendas: ĉiu suferas – ĉu rekte, ĉu nerekte – de krimo. Tamen la registaro malmulton faras: ministroj neas, ke ekzistas recesio, ke senlaboreco ŝveligas krimo-statistikojn. Oni dubas, ĉu promesita manpleno da surstrataj policistoj vere helpos. Male: ju pli longdaŭra la recesio, des pli enradikiĝinta la kvara plej granda industrio en Britio.

Paŭlo GUBBINS

Tago de l' buĉistoj?

Same kiel multaj aliaj landoj, britoj festas la unuan de majo honore al ĉiea laboristaro. Tamen la registaro anoncis baldaŭan nuligon de la ferio-tago, dirante, ke jam okazas en majo tiom da publikaj ferietoj. Anstataŭe ĝi proponas plian ferio-tagon en aŭgusto aŭ en oktobro – memore aŭ al angla sankta patrono Georgo, aŭ al brita marvenko ĉe Trafalgar (1805), aŭ al brita dum-milita ĉefministro Churchill [Ĉeĉil]. Sindikalistoj kaj aliaj akre plendis, ke en Britio estos forgesita internacia laboro-tago, ke aliflanke – en epoko supozeble de eŭropa amikeco kaj kunlaboro – estos honorigita aŭ sanktulo, pri kiu la plimulto de britoj scias nur, ke li buĉis drakon, aŭ sanga buĉado-batalo, aŭ politikistobuĉisto, kiu memorigos pri mondmilito kaj pri eble la plej mallumaj jaroj de la nuna jarcento. Plej verŝajne temas denove pri deziro de dekstrema registaro kaj insulti laboristojn kaj samtempe emfazi „gloran” britan pasintecon... ĉar pro recesio, senlaboreco, fiska kaj valuta ĥaoso, ktp., malgloras brita estanteco.

Paŭlo GUBBINS




Ciferoj signifoplenaj

Antaŭ kaj post la monda Konferenco de Unuiĝinta Naciaro pri Medio kaj Evoluigo okazigita en Rio de Janeiro, oni uzis milojn da dokumentoj kun studoj, datenoj kaj esploroj pri la stato de la monda medio. Jen kelkaj ciferoj tre signifoplenaj.

- Preskaŭ 6000 milionoj da tunoj de karbona dioksido estas elsenditaj jare al la atmosfero. Tia elsendado estas ĉefa kialo de la varmigo de la tero.
- Dum la lastaj cent jaroj, la mez-nombra temperaturo de la tero plialtiĝis 0,5 gradojn. Dum la venonta jarcento, pro varmigo, la mara nivelo povas leviĝi duonmetron.
- Monda meznumero de okupantoj de aŭtomobiloj delokiĝantaj al labor-
ejoj estas 1,3.
- En la 16a jarcento, ĉaroj delokiĝantaj en urboj kiel Madrido moviĝis laŭ mezuma rapideco de 16 kilometroj hore. Nun, la mezuma rapideco de aŭtomobiloj en samaj urboj estas 11 kilometroj hore.
- Ĉiujare 6 milionoj da hektaroj de grundo transformiĝas en dezerton.

- La dig-lagoj konstruitaj en la mondo okupas surfacon kiu egalas al tiu de Francio.
 - Ĝis 30 % de la tuta longeco de ĉiuj riveroj de la mondo estas altgrade poluciitaj.
 - En Sud-Ameriko oni purigas nur 2 % de la poluciitaj akvoj.
 - Litro da benzino kapablas malpurigi 750 000 litrojn da akvo.
 - Litro da uzita oleo povas polucii unu milionon da litroj da akvo.
 - Pasintan jarcenton arbaroj kovris 60 % de la tero. Nun, 40 %.
 - 35 % da eŭropaj arbaroj estas difektitaj pro acida pluvo.
 - Oni kalkulas ke oni konas nur 3 % da specioj de vivaĵoj ekzistantaj.
 - Ĉiujare malaperas 40 000 specioj de vivaĵoj (bestoj, plantoj kaj mikroorganismoj).
 - Ĉiusemajne 1500 elefantoj estas mortigitaj per pafiloj.
 - Ĉiutage 250 000 personoj naskiĝas, 80 % el ili en malriĉaj landoj.
 - Ĉiutage 40 000 infanoj mortas en la Tria Mondo.
- Luiso GILPÉREZ Fraile



Delfenoj, viktimoj de sud-koreaj fiŝkaptistoj, kies fajnaj najlonaj retoj por kaptado de tinusoj kaj ksifioj (spadofišoj), implikas la kompatindajn mamulojn, pereigante ilin grandskale. Responde al la buĉado lastatempe formiĝis en la urbo Nico, unu el la ĉefaj urboj de la franca Mediteraneo, grupo kun la celo starigi en la regiono per internacia agado, rezervejon por la cetacoj (balengentanoj). Necesas ĝuste internacia interveno tial, ĉar ekster teritoriaj limoj mankas la individua nacia sumara suvereneco, kiu povus efiki kontraŭ la amas-mortigado. Dume, la horora miskaptado daŭras.

Alberto SOLARZ


Pulmo atencita

Se oni demandas arbofalistojn en la aŭstria Viena Arbaro, pri la kialo de faligado de tute sanaj arboj – antaŭ ĉio kverkoj kaj fagoj – ili respondas: „Ni ne scias la motivon”. Ŝajne neniu povas tion klarigi. La loĝantoj de trafitaj regionoj de tiu arbaro, kaj ankaŭ multaj ekskursantoj, tre indignas pro tiu arbofaligado. Oni supozas, ke temas pri Mamono, pri profito. Jes, oni klopodas kiel eble plej rapide reforestumi la kalvajn deklivojn, por ke ili ne aspektu tiel dezerte. Sed la rapide kreskantaj piceokulturoj, kiujn oni ĝenerale enmetas, estas por la onta lignoekonomio malaltvaloraj kaj ne povas anstataŭi la valorajn malmollignajn folioarbojn, kverkojn kaj fagojn!

Ĉu vi dormas, verdpartianoj? Vekiĝu!
Gottfried HOFSTÄTTER

Rubaĵ-turismo eŭropa

jara eksporto de danĝera rubaĵo (tunoj)



La konstante kreskanta kvanto de danĝera rubo (kemiaj, venenaj defalaĵoj) kaŭzas problemojn precipe en tiuj ŝtatoj, kiuj havas severajn leĝojn pri mediprotektado. Tial el ili oni transportas danĝerajn rubon al landoj kun malpli striktaj leĝoj. Sed la rezulto estas alarmiga: la plej grandan parton oni simple mergas en la maron...


La fascina mondo de la partikloj:

Kio estas kvarkoj ?


La molekuloj, kiujn oni ne povas mekanike diserigi, konsistas el atomoj. Ekzemple la akvomolekulo havas la kemian formulon H_2O , do estas sistemo el du H-atomoj (hidrogeno) kaj unu O-atomo (oksigeno). Ĝis 1900 oni pensis, ke atomoj estas kompaktaj globetoj. En 1911 la novzelandanga fizikisto Ernest Rutherford [Radafod] sendis radiadon tra ege maldika ora plateto kaj konstatis, ke la radiado preskaŭ senĝene trairis la atomojn. Tio gvidis al la rutherforda atommodelo: ĉiu atomo havas etan kernon.

La diametro de atomo estas 0,1 nanometro (1 nanometro estas unu milion-ono de milimetro), sed la diametro de la kerno estas centmil-foje malpli granda ol la tuta atomo. La diferenco estas giganta: se oni pligrandigus la atoman kernon al la grandeco de homa okulo, la tuta atomo havus la grandecon de 2000metra monto.

Ekde kelkaj monatoj oni povas fari relative klarajn bildojn de molekuloj kaj atomoj per specialaj mikroskopoj. Bildo 1 montras 28 karbonmonoksidmolekulojn, kiujn oni aranĝis sur platena plato en la formo de vireto. Karbonmonoksido (CO) estas venena gaso, kiun oni devis draste malvarmigi por fari tiun eksperimenton.



1. Oni povas nun fari relative klarajn fotojn de molekuloj. Jen 28 karbonmonoksidmolekuloj.



2. Kelkaj atomoj de ksenongaso. Grandigo 10 000 000.

Bildo 2 montras kelkajn atomojn de la gaso ksenono pligrandigitajn 10-milion-foje. La atomkernon oni ĝis nun ne povis rekte bildigi, tamen eblas


scii ties strukturon. Ĝi konsistas el protonoj (plusa elektra ŝarĝo) kaj neŭtronoj (elektre neŭtralaj). La kernon ĉirkaŭas elektronegativaj elektronoj. Protonoj, elektronoj kaj aliaj malgrandaj korpecoj – ekzemple la neŭtrinoj – nomiĝas partikloj. La plej malpeza atomo estas hidrogeno (H) kaj konsistas el unu protono kaj unu elektrono; helio el du protonoj, du neŭtronoj kaj du elektronoj. Kompletata atomo estas do ĉiam elektroneŭtrala.

Kvar fortoj

La gravito ne ludas rimarkeblan rolon, se oni faras eksperimentojn kun unuopaj partikloj. La elektra forto efikas inter elektronegativaj partikloj, ekzemple inter elektronoj kaj protonoj. En la atomkerno konstateblas tri fortoj: la elektra forto inter la protonoj volas eksplodigi la kernon. La kerna forto estas pli granda kaj kune



3. La plej longa koliziilo de l' mondo: 27 km.



4. Neŭtrino trafas de supre unu protonon kaj disfalas al dekoj da aliaj partikloj.

tenas protonojn kaj neŭtronojn. La tiel nomata malforta forto klarigas la radioaktivan disfalon de kelkaj kernoj. Tion oni scias sekve de eksperimentoj faritaj per ringformaj koliziiloj. Temas pli grandaj ringoj (bildo 3), en kiuj oni akcelas partiklojn ĝis preskaŭ luma rapideco (300 000 km en sekundo) kaj koliziigas ilin. La plej longa koliziilo troviĝas nun en la esploroj CERN okcidente de la svisa urbo Genevo. Ĝia longeco estas 27 km, ĝia diametro 9 km.

Kvarkoj



Post la kunpuŝiĝo la partikloj disfalas. La eroj rapidege flugas tra dektiloj, kie oni povas analizi iliajn vojojn. La partikloj alflugas de dekstre kaj maldekstre kaj kolizias en la mezo de la bildo.

En bildo 4 oni vidas la spurojn de multaj partikloj: unu neŭtrino trafas de supre unu protonon kaj disfalas al dekoj da aliaj partikloj. Tiaj eksperimentoj sciigis, ke ankaŭ protonoj kaj neŭtronoj ne estas la plej malgrandaj partikloj, sed konsistas el po tri tiel nomataj kvarkoj. La vorto venas el romano de la irlanda verkisto James Joyce [Ĝejmz Ĝojs], kiu uzis ĝin ŝerce. Verŝajne ekzistas 12 kvarkoj: 6 kvarkoj kaj 6 antikvarkoj. Neŭtrono konsistas el la tri kvarkoj $u+d+d$, protono el $u+u+d$.



Ni konas dekojn da partikloj, la tiel nomataj barionoj, kiuj konsistas el tri kvarkoj. El po du kvarkoj konsistas la mesonoj. Parencajn mesonojn oni povas aranĝi kiel en bildo 5: ekzemple la partiklo D^0 estas sumo el c -kvarko kaj \bar{u} -antikvarko.

Ĉiu partiklo apartenas al unu el tri „generacioj” (bildo 6). La objektoj de la ĉiutaga vivo konsistas el la kvarkoj u kaj d unuflanke kaj elektrono

kaj elektron-neŭtrino aliflanke. Tiuj du lastaj partikloj apartenas al la grupo de la leptonoj. La dua kaj tria generacioj estas grupoj da partikloj, kiuj havas pli da energio kaj gravas dum procezoj kiel ekzemple la elkosma radiado, radioaktiveco kaj eksplodo de steloj. La grandecon de la kvarkoj kaj ankaŭ de la elektronoj oni ne scias, ĉar la plej eta strukturo



5. Parencajn mesonojn oni povas aranĝi tiel: la partiklo D^0 estas sumo el c -kvarko kaj \bar{u} -antikvarko.



KRESKANTA ENERĜIO

6. Ĉiu partiklo apartenas al unu el tri „generacioj”. Supre la tria generacio kun kvarkoj t kaj b kaj leptonoj taŭo kaj taŭ-neŭtrino. Meze la dua generacio kun kvarkoj c kaj s kaj leptonoj muono kaj muon-neŭtrino. Sube la unua generacio kun kvarkoj u kaj d kaj kiel leptonoj elektrono kaj elektron-neŭtrino.

analizebla egalas al unu miliardono de milionono de milimetro. Pli fajnajn strukturojn oni eble povos esplori per pli fortaj koliziiloj, ekz. la LHC-ringo de CERN (longo 27 km, ĝi estos finkonstruita en 1998) aŭ la SSC-ringo en Usono (longeco 87 km, finkonstruita en la jaro 2000). Pli detalaj informoj estas senkoste haveblaj ekzemple ĉe: 1) DESY-PR, Notkestraße 85, D-W-2000 Hamburg 52 (en germana kaj angla lingvoj); 2) CERN, CH-1211 Genevo 23 (en germana, franca kaj angla lingvoj). Walter KLAG

Ŝipkonstruado mortas

La 19a jarcento, la jarcento de la tiel nomata industria revolucio, naskis en Eŭropo — kaj do ankaŭ en Belgio — pezan industrion: minadon, ŝtalindustrion, ŝipkonstruadon. Ŝajnas ke nun, unu post la alia mortos. En septembro fermiĝis la lasta belga karbominejo kaj nur mallonge poste sin anoncis agonio de la lasta granda ŝipkonstruejo: Boel [Bul] en Temse, apud Antverpeno. Tamen, tiu agonio sin prezentas kun strangaj okazintaĵoj. Jen la raporto.

Ĝia propra infano

Fakte, la historio de la lasta ŝipkonstruejo estas iom komplika. En 1986 ankoraŭ ekzistis du grandaj konstruejoj: Boel kaj Cockerill Yards. La unua estis sufiĉe sana, la dua spertis terurajn problemojn. Por savi ĝin, laŭ instigo de la tiama registaro, ambaŭ konstruejoj kunfandiĝis kaj formis novan entreprenon, kun la nomo Boel, kaj financata 51-procente de privata kapitalo; 49-procente de la (flandra¹) registaro.

La eko de la agonio

En oktobro 1992, subite la privataj financistoj unuflanke anoncis ke ili fermos la kontojn de la kompanio kaj petis ĉe la kortumo pri komerco la bankroton de la entrepreno. Ili argumentas ke ne plu sufiĉas la mono por pagi la salajrojn kaj la sociajn kostojn. Reage laboristoj de la ŝipkonstruejo okupas bapto-pretan ŝipon *Flanders Harmony* kaj tiel malbligas ke la ŝipo estas liverota al la mendintoj. Tion ili faris por teni firmajn atutojn por eventualaj venontaj intertraktadoj kun la eksaj aŭ novaj posedantoj.

La kortumo ne akceptis la bankroton, ĉar nur la privataj financistoj kaj ne ĉiuj (do ankaŭ ne la registaro) petis ĝin.

Pro tio la privatuloj estas devigataj intertrakti pri la afero kun la registaro. Sed baldaŭ malkonsentoj aperas sur la scenejo. Kio estas vero estas malfacile eltrovebla por eksterulo. Ambaŭ partioj kulpigas la alian pri promesorompo. La registaro, kiu defendas la principon ke apud ĉiu publika franko, la privataj financistoj metu frankon, asertas, ke la privatuloj ne volas kontribui. La privataj financistoj rebatas ke la registaro ne plenumas siajn promesojn. Ilia plej grava riproĉo estas, ke la registaro ne prilaboris longtempajn mezurojn por certigi la sanigon de la financa situacio de la kompanio. Precipe la

fakto ke la registaro ne volas liveri longdaŭrajn pruntojn kun ŝtata garantio, por ili estas neakceptebla.


Strangaj okazintaĵoj, strangaj sciigoj

Malgraŭ devigaj intertraktadoj, malgraŭ ankaŭ la interveno de du gravaj politikistoj de la trafita regiono (membroj de ambaŭ regantaj politikaj partioj, kaj nepre bezonantaj la publikan subtenon en venontaj voĉdonadoj) la partioj ne atingas iun ajn interkonsenton. Kaj denove la privataj financistoj petas bankroton ĉe la kortumo. Tamen, la kortumo *ne akceptas* la bankroton, ĉar la situacio de la kompanio ne estas funde senespera!

Ĉu ne? Dum la intertraktadoj oni sciigis al la publiko kelkajn rimarkindajn financajn aspektojn. La plej miriga estis ke la kompanio jam ricevis pli ol 3 miliardojn por venontaj kontraktoj... kaj ke jam forvaporigis pli ol la duono de tiu mono, kvankam oni faris ĝis nun nenion aĉeton... Oni do rajte miris kial la kortumo prokrastis la bankroton.

Memkompreneble la kialo estas klara. La registaro nepre volas savi la kompanion, tamen sen enverŝi monon en nigran truon. Kaj tial ĝi klopodas allogi novajn kapitalliverantojn. Vivanta kompanio valoras pli ol mortinta... do, nepras prokrasti la bankroton.

La scenaro tamen fiaskas, kaj finfine la kortumo decidas pri la bankroto de la ŝipkonstruejo. Kuratoroj estas devigataj monigi la aktivaĵojn kaj serĉi aĉetontojn. Intertempe la laboristoj ne nur okupis la finkonstruotan ŝipon sed la tutan konstruejon. Ili kun granda malfido sekvas la okazantaĵojn kaj ĉiutere malhelpas la laboron de la kuratoroj. Ili postulas ke ili mem transdonos ĉiun dokumenton, kiun la kuratoroj bezonas; kaj nur transdonas ilin post severa kontrolo. Se estas iu dubo, ke



uzo de iu dokumento malhelpos la laboristajn aferojn, ili rifuzas transdoni ĝin.

Lasta evoluo

La afero fluis pli malpli trankvile, ĝis komence de novembro, aŭdiĝis la rumoro ke granda germana ŝipkonstruejo *Vulkan* el Bremen, kiu ankaŭ antaŭ mallonge transprenis similajn entreprenojn orient-germanajn, interesiĝis pri Boel. Ĉu do bankrotinta kompanio ja vendeblos? Samtempe oni anoncis la alvenon de japanoj, kiuj mendis ŝipojn ĉe Boel kaj jam antaŭpagis 600 milionojn. La milionoj estas for, la ekkonstruadon de la ŝipoj oni ankoraŭ eĉ ne prikonsideris.

Intertempe la laboristoj konsentis — por vekti fidon ĉe la aĉetontoj — malokupi kaj finkonstrui la ŝipon *Flanders Harmony*. Pro la prokrasto de liverado la kompanio ŝuldas grandajn monpunojn, kaj tio estas malagraba afero por aĉetonto. Kvankam la laboristoj fordonas grandan atuton, liberigante la ŝipon, ili esperas gajni la bonan volon de *Bremer Vulkan* kaj tiel savi estontajn laborpostenojn.

Konkludo

Ofte oni diras ke ŝtataj entreprenoj malbone funkcias. Plejofte oni nuntempe referencas al la fiaskintaj, komunistaj ŝtatentreprenejoj. Sed tiu kazo pruvas, ke ankaŭ privataj entreprenoj suferas saman malefikecon. Kaj oni juste povas dubi, ĉu ne okazis gravaj, eble eĉ krimaj, fuŝoj.

Guido VAN DAMME

1. Pro ŝtatreformaj kialoj la peza industrio, dividita en kvin diversaj sektoroj, iĝis „regionaj aferoj”. Tial ne la belga, sed la flandra registaro decidas pri ŝipkonstruaj problemoj.

ARGENTINO

La rivero Chubut

Por vidi kaj sperti regionojn kaj landojn rekomendindas sekvi ties rojojn kaj riverojn. Neniel kaj nenie oni povas percepti en malpli da tempo pli da pejzaĝoj kaj detaloj. Sed tia sekvado ne facilas, se la celata akvo-fluo ne estas surveturebla aŭ nur malfacile alirebla. Tiaj karakterizaĵoj aplikas parte al la rivero Chubut [Ĉubut], la plej longa rivero de Patagonio. Pli ol 800 kilometrojn ĝi tra-serpentumas aridajn montojn kaj magrajn stepojn, kiuj multloke similas al dezerto.

En ĝia komenco en la deklivo de la Cerro Carreras (Monto Kareras) (2350 m super la marnivelo) kelkaj arbaretoj de Lenga (*Nothofagus pumilio*) ornamas la riveran originon. Pli alvare tre malfacila vojo, veturebla nur por ĉiaterene uzeblaj veturiloj, kondukas al metala minejo ekspluatata per tre primitivaj metodoj.


Antaŭ ol eliri la valon de sia naskiĝo, Chubut trafluas inter du grandegaj rokkolonoj ŝajnigantaj eniron al alia mondo. Fakte iom post iom la geografia medio nun ŝanĝiĝas. Aperas malgranda elementa lernejo, kie indianaj infanoj de la ĉirkaŭaĵo lernas legi kaj skribi. Ĝis tiu loko kajakisto sukcesinta transporti sian boaton almonte, povus surveturi la riveron, sed nur en la akvoriĉaj printempaj monatoj. Ekde la menciita lernejo pneŭmatika boateto povas atingi la vilaĝon El Maitén en pli malpli ses horoj. Tia silenta vojaĝo tra vasta, soleca stepo estas impona travivaĵo. Post El Maitén nia klopodo surveturi la riveron en kanuo malsukcesis post kelkaj kilometroj, ĉar la branĉoj de la riverbordaj salikoj fermis la trapasejon kaj kombinitaj kun la fluforto danĝerigis la veturon. Sed proksime al la enfluo de la flanka rivero Gualjaina [Gualĥajna] Chubut plilarĝiĝas kaj estas surveturebla pli ol 300 kilometrojn. Tie oni mezuris akvokvanton kun jara averaĝo de 73 kubaj metroj sekunde.

Pli alvare akvobaraĵo, kies artefarita lago kovras 7000 hektarojn, transformas la riveron, kiu proksime al la urbo Rawson enfluas Atlantikon.

Werner SCHAD



La masivo de l' monto Carreras kie naskiĝas la rivero Chubut.



Arbaretoj de Lenga ornamas la plej altan parton de la rivero.



Antaŭ eliri la valon de sia naskiĝo la rivero pasas inter du rokaj kolonoj.

La ĉina


中文

Ĉi tiun lingvon parolas pli da teranoj ol iun alian — 825 milionoj¹ — eĉ se oni pritraktas nur la „mandarenan” varion. Tamen, ĝi ne kutime konsideriĝas kiel kandidato por LA universala lingvo, parte pro iuj siaj lingvaj malfacilaĵoj por tiuj, kiuj parolas malsimilajn lingvojn, parte ĉar ĝiaj parolantoj koncentriĝas en unu parto de la mondo.

Ja troveblas malgrandaj komunumoj da ĉin-parolantoj en multaj aliaj landoj, sed ili plejofte estas iom apartaj de la superrega komunumo pro ties (kaj la propra) konscio pri la unikeco de la ĉina kulturo. (Cetere, ankaŭ en Japanio la ĉina lingvo tradicie ĝuas grandan prestiĝon.) Krome, plej ofte la eksterĉiniaj ĉinoj, la *huáqiáo* [ĥŭaĉhaŭ], ne parolas la plej grandan specon de la lingvo, la mandarenan aŭ *pŭtongĥuà* [phuthungĥŭa] de la regiono de Pekino, sed alian, kiel la kantonan de ĉirkaŭ Hongkongo.

Fakte estas demando, ĉu tiuj aliaj varioj estas nuraj „dialektoj” aŭ apartaj lingvoj. Gramatike ili estas similaj, sed pro malsamaj sonoj ili ne estas interkompreneblaj. Tamen, se parola lingvo disiĝas, skriba lingvo kunigas.

La ĉinaj skribosimboloj *hánzì* (ĥancioj) havas (preskaŭ) neniun rilaton kun la parolata ĉina; ili baze prezentas ne sonon — kiel faras nia Esperanta alfabeto — sed tutan ideon, pro kio oni ofte nomas ilin ideografiaĵoj. Do, anstataŭ 28 literoj, kiel en Esperanto, kiujn oni



kapablas kombini por prezenti iun ajn vorton, la ĉina havas principe apartan ĥancion por ĉiu vorto, kiu krome konsistas preskaŭ ĉiam el nur unu aŭ du silaboj. En la moderna lingvo oni oftege kombinas ilin por krei novajn vortojn; ekzemple *wài-guó* [ŭajkŭo] = „ekster-lando”. La ĥancio-sistemo originas el veraj desegnaĵoj de koncernaj objektoj, sed hodiaŭ apenaŭ similas al tio kion ili prezentas; ekzemple 月 („monato”) origine estis ☾ , do vera (duon)luno.

La ĉinoj devas parkere scii 3 ĝis 4000 tiajn ideogramojn por legipovi ĵurnalon, sed entute ekzistas pli ol 47 000 simboloj! Evidente, tio estas granda postulo por la memorkapablo de lernanto, ĉu eksterlandano aŭ ĉino mem. Kaj tiu problemo iĝis eĉ pli komplika ĉi-jarcente.

Dum Tajvano kaj Hongkongo ankoraŭ utiligas la tradiciajn ĥanciojn rifuzas ŝanĝojn, samkiel la plimulto de *huáqiáo*, komunisma Ĉinio mem, post la revolucio, simpligis ilin iom arbitre, por plifaciligi lernadon kaj skribadon. Japanio same simpligis la de ĝi uzatajn ĥanciojn ... sed alimaniere ol en P.R.Ĉinio!


Do, certe la eksterlanda lernanto, frontanta tiujn diversajn ĉinajn skribsistemojn, por majstri nur unu el ili, devas fari saman kvanton da laboro kiel por lerni (almenaŭ) unu alian lingvon! Li aŭ ŝi do povus decidi resti prefere „analfabeta”. Ne mirige, ke ĉinaj skribmaŝinoj estas monda ŝerco...

Kompreneble, kiel aplikate en tiu ĉi artikolo, ekzistas diversaj „romaj” (latinliteraj) transskriboj por la ĉina, kvankam ili eble ĉiuj ankoraŭ restas tre konfuzaj por alilingvanoj. Denove, tiu uzata en Tajvano malsamas de tiu en la Popolrespubliko, nomata *pinyin* [phinjin]. Sed, se eĉ la komunistoj, kiuj tute kaj perforte renversis la malnovan socion, ne sukcesis venki la ĉinan konservatismon ĉi-rilate, kaj do ne vere sukcesis realigi sian planitan „romaniĝon” de la lingvo, tiam certe estas mal multe da estonteco por la nun oficiala ĉina alfabeto anstataŭ ĥancio ...

Kaj oni ne pensu ke la ĥancioj estas tute senavantaĝaj por tiuj kiuj ja sukcesis lerni ilin. Ĉar la *skriba* lingvo estas sama ĉie, legipovuloj ankaŭ ĉie povas komuniki *skribe* inter si — eĉ se ne parole — kaj tio estis grava faktoro en konservado de la plurjarmila unueco

de la ĉina civilizacio. Krome, oni povas legi tiajn tekstojn iom pli rapide ol per litera sistemo. Kaj la ĉinaj simboloj plie permesas distingi (ĉiam nur skribe!) inter la parolaj homonimoj, kiuj abundas en la ĉina.

Aliflanke, en nia moderna mondo de vastaj internaciaj kontaktoj kaj invado de novaj sciencoteknikaj konceptoj, la malnova skribosistemo konsistigas granda handikapo. Ne-jam-ĉinaj nomoj kaj fremdaj terminoj estas malfacile asimileblaj, ĉar oni devas prezenti ilin per kombinaĵoj de ekzistantaj malnovaj silaboj-signoj, kiuj ne povas ne resti malproksimaj de la originala formo. Tial, malofte renkontataj fremdaj loknomoj povas skribiĝi ĉiun fojon malsame!



Manuskripto de fama ĉina verkisto „Kwa Mo-Jo“.

Alia aspekto de la problemo estas la sonsistemo. La mandarena havas entute nur 34 fonemojn (bazajn parol-sonojn), kio estas relative malmulte kompare al aliaj lingvoj. Kaj tiujn oni rajtas kombini en nur 400 unusilabojn. La ĉina cetere estas t.n. „tonlingvo“ kun 4 eblaj tonvarioj: se oni elparolas iun silabon laŭvice kun ĉiuj tiuj kvar tonoj, tiam oni akiras ankaŭ kvar divers-sencajn vortojn. Sed multiplike niajn 400 silabojn per tiuj 4 tonoj, oni teorie ricevas tamen nur ĉirkaŭ 1 600 vort-silabojn — teorie, ĉar en realo ne ĉiuj kombinaĵoj ekzistas. Tio estas fakte tro malmulte por monde tiel grava lingvokomunumo, kaj sekve de

tio aperas multaj e la jam menciitaj homonimoj. Kiam do okazas unu tia konfuzo en la parola lingvo, la parolanto sufiĉe ofte devas iel „desegni“ la celatan ĥancion en la aero, por komprenigi sin!

Eksterlandanoj komence trovas malfacila la ĉinan prononcadon, aparte la uzadon de tonaltecoj, por esprimi dirvolon, ne nur (eble) emocion. Sed la gravecon de la apartigo de tonoj montras paroj kiaj *mǎi* (kun falanta, poste leviĝanta tono), kiu signifas „aĉeti“, kaj *mài* (kun nur falanta tono), kiu signifas „vendi“, do ĝuste la inverson. La ĉina tamen ne estas la sola tonlingvo; tiaj lingvotipoj troviĝas ankaŭ aliregione en Orient-Azio kaj eĉ en Afriko. Sed prononcado ne estas longdaŭra problemo. La mandarena kun siaj „molaj“ sonoj estas unu el la plej belsonaj ĉinaj „dialektoj“.

Gramatike ĝi estas unu el la plej simplaj lingvoj de la mondo; kvankam ili eraras, iuj homoj kuraĝas diri eĉ, ke ĝi tute ne havas gramatikon! Per tio ili celas, ke ĝi ne faras konjugaciajn aŭ deklinaciajn ŝanĝojn en la formo de vortoj, kiel estas la kazo en eŭropaj lingvoj. Eble la plej malfacila gramatika eco por lernantoj de la ĉina, estas la deviga uzado de normalaj vortoj anstataŭ numeraloj por esprimi kvantojn; iom simile al la vorto *botelo* (kun signifo „mezuro“) en kvar *boteloj da suko*. Tiaj mezurvortoj troviĝas en multaj malparencaj lingvoj de orienta Azio; oni devas lerni la ĝustan vorton por klasigi la substantivon, kaj iuj ŝajnas tute arbitraj. Sed ili ja estas helpiloj por apartigi alie samsonajn vortojn.

Tamen, ĝenerale la ĉina havas pli simplan gramatikon ol iu alia granda lingvo; probable senkonsidere de la lingvospeco kiun parolas la lernanto. Ĝi eĉ estas pli simpla tiurilate ol Esperanto, sed probable ne ĉiam kapablas atingi la saman nivelon de precizeco. La ĉina estis jam tre grava lingvo dum la tuta homa historio kaj, kun la aktuala releviĝo de Ĉinio, ĝia graveco en la sekvonta jarcento sendube povos nur kreski. En ĝia nuna fazo, kun ĝia fonetika malriĉeco kaj (speciale) ĝia malfacile lernebla skribosistemo, estas malfacile antaŭvidi ĉu ĝi iam iĝos LA mondlingvo. Sed por tiuj, kiuj scipovas ellerni ĝin, ĝi estas unu el plej fascinaj lingvoj en la tuta mondo.

Bradley KENDAL

1. Ciferoj el la lingvolisto de Sidney Culbert (MONATO 4/91, p. 18). Tiaj statistikoj kompreneble jam eksvalidiĝis antaŭ ol publikigo kaj ĉiel dependas je difinoj de „lingvo“ kaj kiel bone oni ĝin parolas.

LINGVA STATUSO

Kataluna aŭ valencia?

De tempo al tempo, la polemiko pri la karaktero de la valencia kiel aparta lingvo fenikse reviviĝas. Lingvistoj asertas ke la valencia estas geografia variaĵo de pli vasta lingva realo konata kiel „la kataluna“. Por populara vidigi la aferon en Hispanio, ili ofte komparas la lingvan statuson de la valencia kun tiu de la andaluza rilate la kastilian. Tiun starpunkton subtenas ankaŭ la tri ĉefaj valenciaj universitatoj kaj la aŭtonoma televidkanalo. Kontraŭ ili troviĝas pluraj institucioj, kiaj la Akademio pri Valencia Kulturo, aŭ politikaj partioj kia U.V. (Valencia Unuiĝo) kiuj pledas (eĉ manifestacie) por ĝenerala agnosko de la aparta naturo de la valencia, kiel hibridaĵo de la latina kaj la araba, kaj strebas por alia ortografio.

Ekstravagancaj teorioj

Tamen, por renomaj lingvistoj kiaj Badia i Margarit aŭ Salvador Caja [Kaŝa], temas nur pri ekstravagancaj teorioj kiujn nefakuloj ĉiam emas disvastigi. Ili fakte ne kontraŭstaras la terminon valencia por signi la fenomenon, ĉar ĝi jam iĝis sufiĉe populara en la kampo de la latinida lingvistiko, sed penas por ke oni metu gin en la ĝustan lokon.

Politiko kontraŭ publiko

Sed la ĝenerala publiko saĝe komencas kapti la nominalisman kaj politikan karakteron kiun prenas la afero: Oni pensas ke fakte la diskuton starigas la konkreta nomo kiun oni donas en konkreta zono al lingva fenomeno ĝenerale agnoskata kiel unueca. Aliflanke, en la politika fono, sidas la tiel nomata „kataluna koloniado“, kiun la *Generalitat* [Jeneralitat], la aŭtonoma kataluna registaro, delonge efektivas sur la valencia teritorio. Fakte, multaj katalunoj ne rezignas pri sendependa ŝtato kiu ampleksu la tutan katalunan „lingvion“, do inkluzive Valencion. Ĉiaokaze, estas nedubinde ke, laŭ la nuntempaj cirkonstancoj, la afero solviĝos pace kaj ene de demokrataj limoj.

Alberto FRANCO

Leksikologia fakgazeto

En septembro 1992 estis lanĉita nova faka informgazeto en gaela lingvo, pri vortaroj kaj leksikografio. La periodaĵo, kiu aperas ĉiumonate, titoliĝas *Gluais* [Glueŝ] („Gloso”), kaj estas unikaĵo en Irlando.

Ĝi donas informojn, ne nur pri vortaroj unulingve gaelaj, sed ankaŭ gaelaj-fremdlingvaj kaj fremdlingvaj-gaelaj, kaj krome pri vortaroj en aliaj lingvoj neanglaj, inkluzive de Esperanto. Anglalingvaj verkoj estas ekskluditaj, ĉar *Gluais* estas redaktata de la vidpunkto de uzantoj de la irlanda lingvo, kaj certe pro la fakto, ke jam abundas fakaj publikaĵoj pri anglaj referencaj verkoj en angla lingvo.

Jam aperis artikoloj kaj informoj pri ekzemple la unuaj unulingvaj vortaroj de la irlanda kaj de la skotgaela lingvoj, pri malnovlingvaj/novlingvaj leksikonoj, pri poŝvortaroj, pri bretonlingvaj vortaroj, ktp. Aparte interesa por esperantistoj estas artikolo en la tria numero (1992), pri la uzado de Esperanto kiel vortara interlingvo. Jen ekstrakto el tiu artikolo, kies titolo signifas „Multobla ligo prefere al duobla ligo”:

„Venis interesa rekomendo de Breandan O' Mearain [Brandon O Marejn], kiu diris:

– Rilate al preparo de la dulingvaj vortaroj, kiuj mankas al ni, mi volus rekomendi la internacian lingvon kiel perilon. Tio estas rimedo por ekskludi la anglan de la agokampo. Ĉu ne jam temp' está? Antaŭ ĉio ni devos kompili irlandan-esperantan vortaron, kaj ĉiuokaze, tion bezonas parolantoj de la gaela, kiuj lernas tiun lingvon. Kiam ni havos la menciitan vortaron, ni povos enkonduki, ekzemple, vortaron esperantan-germanan, kaj uzi ĝin por kompili vortaron germanan-gaelan. Ni farus same pri la franca, la itala, la hispana, la bretona, ktp.

– Krom eviti la anglan, estas aparte grave uzi Esperanton ĉe ĉi tiu laboro. Popoloj, kiuj parolas malpli grandajn lingvojn ege bezonas lingvon neŭtralan kaj sendanĝeran, kiel interlingvon. Ĉi tiu verko (vidu malsupre) pravas al vi, ke tia helpilo ja estas havebla, kaj efike funkcias.

Menciinde estas, ke en la jaro 1985, aperis poŝvortaro titolita *Geiriadur Esperanto/Kimra vortaro*. La kompil-

into estis J.C. Wells. Krom tiu vortaro kaj la inversa *Geiriadur Cymraeg ac Esperanto* – ĉiu konsistanta el 3000 vortoj – ĝi inkludas artikolon „Pri la lingvo Esperanto”, kiu prezentas la historion kaj la principojn de la internacia lingvo, kaj plian artikolon – „Pri la kimra lingvo” – kiu klarigas la historion kaj la principojn de la kimra.

Breandan mem jam komencis prepari vortaron esperantan-gaelan kaj vortaron gaelan-esperantan (*Foclóra Gaeilge-Esperanto*.)

Legantoj kiuj deziras aboni *Gluais*, turnu sin al la eldonisto:

Pádraig Mac Giolla Ruaidh, 64 Páirc Ghiolcach Shléibhe, Dún Muirigh, Belfast BT17 ODW, Nord-Irlando).

Garvan MAKAJ'

Kontribuojn por la rubriko „lingvo” vi sendu al:

Girvan MacKay
The Manse, Clonminch
Tullamore, Co. Offaly
Irlando



En la irlanda ĉefurbo Dublino situas la sidejo de l' Eŭropa buroo pri malpli disvastiĝintaj lingvoj. Inter la pasintjaraj eksterlandaj vizitantoj al tiu oficejo estis dudek reprezentantoj de la friul-lingva komunumo en nord-orienta Italio. La grupo havas rilaton al la friula dissendejo Radio Onde Furlane. Ili informis, ke cent mil homoj en tiu parto de Italio parolas la friulan lingvon. En la bildo vidiĝas kelkaj membroj el la friula grupo, kune kun stabanoj de la buroo kaj la direktoro, Dónall ó Riagáin [Donól o Ríagojn].

GMA

Modesta humuro

Memoraĵetoj kaj notoj konsistas el du partoj. La *Memoraĵetoj* estas libro kiu datumas el la jaro 1992 de la sovaĝa epoko. Ĝi estas unu el la malmultaj presaĵoj retrovitaj post la granda katastrofo de 2020 kiu preskaŭ ekstermis la homaron. En *Notoj*, arkeologoj el la jaro 1475 post la katastrofo provas klarigi la enhavon de *Memoraĵetoj*. *Notoj* estas la pli interesa parto. Jen iom humure, jen iom satire ĝi komentas la strangan vivmanieron de tiuj estaĵoj kiuj vivis en la sovaĝa erao antaŭ la katastrofo. Ideo ne malbona, grafika prezento tamen tre modesta.


pp

A. Lopez Luna: *Memoraĵetoj kaj Notoj*. Eld.: Amigos de Lopez Luna, Buenos Aires, 1992, 3a eld. 80p. ISBN: 950-43-4189-6. Akirebla ĉe la eldonejo (Amigos de Lopez Luna, Casilla Correo 2507, RA-1000 Buenos Aires) kontraŭ 10 NLG, inkl. afrankon.

Valora sed kun makuloj

Slovena literaturo – mi tion konfesas – estis por mi „tabulo nesribita”. Mi anticipis ion nematuran, provincisman. Legante ĉi dek unu slovenajn novelojn el la periodo 1945-90 mi konstatas, ke tio estis stulta kaj senbaza antaŭjuĝo. La noveloj male aperas kiel eroj de tre riĉa, matura, interesa prozo. Precipe plaĉis al mi la noveloj de Rebula, Zupanĉič kaj Janĉar.

Preskaŭ ĉiu novelo prezentas dilemon moralan, ĉu scenigitan per la agoj de homoj, ĉu psike internan. Tra la tuta novelaro – kun escepto nur de la ĉarma rakonteto de Kramolc – regas etoso iom melankolia. Multaj el la noveloj temas pri mortonto, mortinto, entombigo. Ĉu tio spegulas nacian atmosferon dum la koncerna epoko? La lingva stilo de la traduko baze apartenas al la ĉefa meza fluo de moderna Esperanto. Eble ĝin iomete tro ŝarĝas afiksoj, kio foje pezigas la dialogon. Troviĝas ankaŭ lingvaj makuloj, kiel amaso da mislokitaĵoj, ofta konfuzo pri transitiveco de verboj (ekz. konfuzigi, sveniĝi, ion degeli, degeliĝi, falita, raviga, konduti sin, putrita), malĝustaj vortformoj (ekz. kurvo, borelo, provenca, kvadro, fetuso, skarpenti), kaj erara aŭ nekutima uzo de vortoj (ekz. de ĵus, fraŭlo, tiro, kviki, per). Tiuj ne ĝenas la komprenon, sed krome aperas kelkloke



vortumoj, kies sencon mi ne kaptas, ekz. „paŝis inter vastan foston”, „kandeloj ekĉirpis”, „En la trunkoj de la malalta arbedaro fluetis peĉo; ili ĝin forskrabis kaj prenis al siaj buŝoj”, „Aldone ŝi vidas alte arbokrokaj malantaŭe altajn domojn”.

La lingvaj makuloj tamen ne kaŝas la literaturan valoron de tiu ĉi libro, kiun mi rekomendas al legemuloj ĉiunaciaj. Mi fidus je la talento, kapablo kaj emo de la tradukinto estonte dediĉi pli da zorgo, ambicio kaj laboro al lingva polurado, kaj akcepti konsilojn de aliaj kompetentuloj. Kaj li foje legu la Biblion, kie li trovos ne Kajnon kaj Abelon, sed Kainon kaj Habelon, kaj ekscios, ne ke „en polvon vi reiros”, sed ke vi refariĝos polvo!

Sten JOHANSSON

Vinko Ošlak (red.): *Je la suna flanko de Alpoj*. Antologio de la moderna slovena novelaro. Tradukis el la slovena Vinko Ošlak. Eld.: Mohorjeva, Klagenfurt/Celovec, 1992. 320p. ISBN: 3-85013-261-7. Prezo ĉe FEL: 420 BEF + afranko, ĉe UEA: 24 NLG + afranko.

Mozaika spegulo

Per tiu ĉi libreto eblas sekvi la evoluon de unu el la plej grandaj talentoj en la nuntempa Esperanto-beltro. Bedaŭrinde la pecoj portas nek daton, nek fontindikon; ni scias nur, ke ili aperis „disŝutitaj en diversaj revuoj” en la jaroj antaŭ *Ombro sur interna pejzaĝo* (1984). Fakte, eĉ tiu indiko estas misa, ĉar „Aŭstralio” dividis la unuan premion pro prozo ĉe la belartaj konkursoj de UEA en 1987, kaj ankaŭ aliaj libreroj postiris la romanon.


Same kiel *Ombro*, la kolekto konsistas el mozaikaj bildoj pri la vivo – aŭ pli ĝuste, pri iu difinita vivo, pri la vivo de literaturama kroata esperantistino, kiu tre similas al la aŭtoro mem. Ni ekscias pri ŝiaj amrevoj kaj elreviĝoj, kongresado kaj gastigado, surprizaj ekĝojoj kaj renkontiĝoj kun

la morto. Kaj preskaŭ ĉiuĉapitre okazas tiu eta miraklo de sukcesa arto: kvankam la mozaikeroj estas prenitaj el ŝia vivo, la kreita bildo ŝajnas spegulo de la nia.

Tiu „ni” indikas: „ni homoj”, sed ankaŭ „ni esperantistoj”. La libro estas verkita ne por iu ajn homgrupo, sed ĝuste por tiuj samsortanoj, al kiuj „fatale alrampis la lingvo de Lazaro Ludoviko Zamenhof”. Per tenera humuro Ŝtimec rekreas la etajn ironiojn, kiujn ĝi kunportas – kaj la profundajn verojn, kiuj kaŝiĝas sub ĝia surfaco. Tradukproblemo najbaras al pacekzerco. Nepagipovan malgajon sekvas ridiga rakonto pri gastigado. Ŝtimec havas plian komunaĵon kun niaj grandaj poetoj: ŝi pretas labori. Tiu ĉi jardeko da tekstoj vidigas la zorgon, per kiu ŝi tajlis kaj poluris sian stilon. Kaptu ĉiun ŝancon por ekkoni ĝin. Jen unu el la fondoŝtonoj de literaturo, kiun ni plenrajte povos nomi nia.

Mark FETTES

Spomenka Ŝtimec: *Vojaĝo al disiĝo*. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1990. 90p. Prezo ĉe FEL: 240 BEF + afranko, ĉe UEA: 13,50 NLG + afranko.



Represoj

Libroteko Tokio denove surmerkatis la romanon *Neĝa lando* de Kawabata Yasunari, tradukitan de Konisi Gaku, la 12an libron en la serio Oriento-Okcidento. Ne temas pri nura represo. La tradukinto klarigas: „Antaŭ dudek jaroj mi devis plenumi la tradukadon relative rapide, eĉ meze de la studentaj ribeloj. Okaze de la dua eldono mi pliĝustigis dekojn da lingvaj malglataĵoj kiuj siatempe enŝteliĝis. Mi ĝojas, ke la nova eldono denove donas al la internacia legantaro la ŝancon frandi tiun ĉi perlon de la japana literaturo.” 115 paĝoj. Bindita. Prezo ĉe FEL: 510 BEF + afranko; ĉe UEA 27 NLG + afranko.

Timo

de Juan Lázaro
Besada Toledo


Kie? Ne gravas. Ĉiutage okazas pluraj faktoj ĉie ajn kaj ne necesas esplori ĝis eltrovo de la koncernaj lokoj. Ĉefrolantoj? Povas esti unu aŭ multaj, ĉar kio estas esenca, vere sukoplana, estas la fakto mem. Ĉio alia fariĝas balasto kiu ne utilas por la rakontfadeno. Kiam? Ĉi tiu lasta demando fariĝas obsedo, ĉar nia vivo mortas minuton post minuto kaj ni, foje gaje, foje triste, ĉeestas tiun morton. De la naskiĝo – hazardaĵo kiun ne ĉiuj atingas – ĝis la lasta vivspiro ĉio limiĝas al simpla vojaĝo ĝis la morto, ĉar nenio plia eblas. Ni ne forkonsumas la tempon; tute male, ĝi forkonsumas nin. Tial, demandoj ne gravas kiam ili tute ne helpas. Se io ne utilas, ĉu vere meritas klopodi tiri profiton el ĝi? Plej verŝajne decas ke ni pensu, ke la nura signifohava demando estas kial. Ĝi ja valoras, ĝi ja utilas kaj pruvas, ke nur la kaŭzo gravas.

Nun mi revenas ĉi tien. Homoj inundas la avenumon plej proksiman al la maro. Kaj promenas, konversacias, ridas, home agas. Tamen, ili timas. Jes, ili timas la estontecon, ili timas ĉion, kion ili ĉiutage alfrontas, ili timas sin mem. Tiu estas tre stranga sento, sento ne facile komprenebla, ĉar ĝi apartenas al nia subkonscio, al tiu vero kiun ni suspektas pri ni mem sed nek kapablas nek volas akcepti. Eĉ dum feliĉaj, gajaj, ĝuplenaj momentoj, timo kaptas la animon kaj inundas la memon per nekredeblaj, fantastaj vizioj.

Kial tio okazas? Klarigo ne facilas; nur eblas konjekti, supozi, hipotezi.

Mi rigardas tiujn vizaĝojn ĉirkaŭantaj min, kies trajtoj portas signojn de maltrankvilo. Ili ĉiuj elvokas kiu scias kion. Foje, kvazaŭ frenezo ĉizigigas sur ili, malgraŭ ke spontanaj ridoj mildigas la eksterajn. Neniu vivanta estaĵo havas facilan vivon, tute ne. Akcepti la defion de propra lukto kontraŭ ĉiaspecajn malfacilaĵojn igas ĉiujn nanoj. Necesas kuraĝo, volforto kaj entreprenemo por alfronti ĉion laŭlonge de la vojo kaj sukcesi. Sed la plej impona malamiko estas tiu timo kiu alproprigas al si ĉiujn animojn.

Retroirante en la tempo, kvankam ĝi estas simpla nocio kies diversaj eroj portas nin en unikan finan celon, ko-



munan al ĉiuj, memoraĵoj fariĝas atestaĵoj pri la homa vivo, kies ĉefa celo estas eskapi la timon per ĝuado de tiu tempo kiun la morto donacas al ni de la naskiĝo.

Alproksimiĝante al juna, enamiĝinta paro per preskaŭ silentaj paŝoj, mi kaptis kelkajn vortojn iliajn. Ili prezentiĝis al miaj oreloj kvazaŭ kolomba flugo. Dume, la maro, lazura kaj kvieta, simila littukon etendiĝis fone. La geamantoj flue konversaciis elverŝante la enkorajn sentojn. Ili flustris esperojn kaj dezirojn, sed timvalde fine kaptis iliajn parolojn. Ili petis unu al la alia eternan amon, ili juris kaj demandis unu la alian pri ĉio ajn. Kaj mi konstatis, ke timo ĉefrolis. Eĉ en amoretoso!

Mi ne junas, mia hararo iom post iom forfalas de mia kapo. Ĉe mi ekas sig-

noj de maljuniĝo. Muzikaj preferoj stagniĝis jardekojn antaŭe, eble nur nun mi konstatas tion. Pensoj tristaj ofte turmentas min. Kial?

Ĉi tiu sinjoro kiun oni nomas tempo voras miajn viscerojn. Sklerozigintaj ĉeloj, encerbe, tute ne povas kompreni kial mi postvivis la lastan militon. Nu, tio foje okazas. Apud mi iuj fumas, aliaj drinkas, kantas, gitarludas aŭ simple rigardas la lazuran maron. Mi, ero en tiu ventoblovo, paŝas senbrue, kaŝita en la lasta ombro de vaganta espero.

Jam pasis du jarcentoj de kiam mi lastfoje vizitis ĉi tiun planedon, sed ankoraŭ timo superregas ĉiujn korojn. La horloĝo angore, litanie, senlace tikakas. Prefere mi retrovu la traboritan silenton. Tie, nur tie kie ĉiuj esperoj vanas kaj silento regas, timo ne premas.

de Julius Balbin

Akvarelo

La ondolangoj de l' maro
lekas la sablojn de l' plaĝo
Dum ĝi scintilas en la suno,
la ondoj rompiĝas kaj ŝaŭmas
je ĉiu tajdo.

La maro estas griza kaj blanka ĉe l' bordo,
iĝas verda en la mezo
kaj violkolora ĉe l' horizonto.
Hodiaŭ partojn de ĉielo kovras densaj nuboj,
kiuj plipezigas la aeron
plenan de mararomo.

Blanka jaĥto
lante flosas surface de l' akvo
kaj malaperas malantaŭ la vidlimo.
Milda brizo karesas la ondojn,
vibrigante la aeron.
En la maro naĝas grupo
da duonnudaj gejunuloj,
dum aliaj sekiĝas sub la malfortaj sunradioj,
aŭ pilkludas sur la sabloza strando.

Laŭborde de l' maro
blankaj boatoj flosas
surface de l' akvo,
dum laŭlonge de l' plaĝo
homamaso diverslingve promenas
sub altaj palmoj.

La ĉielo nun sennubiĝis
kaj la suno varmigas la aeron,
igante la akvon fajreri.
Multaj junaj knabinoj
plivigligas la promenadon
per sia gracio kaj beleco.
La vivo pulsas trankvile ĉi-tie,
vibrigante mian animon
kaj plifortigante mian korpon.

Tel-Avivo, aprilo 1992

Belzec

Laŭ la observo de SS Leŭtenanto Kurt Gerstein,
kiam la gaskamero jam tute pleniĝis,
la viktimoj staris sur la piedoj de aliaj
viktimoj, tiom da ili estis enpuŝitaj.
Post kiam la pordo fermiĝis,
dudek kvin minutoj forpasis.
Multaj estis nun mortaj.
Post tridek du minutoj
ĉiuj estis mortaj.

La pordo estis malfermita.
La mortintoj staris rekte
kvazaŭ kolonoj el bazalto,
kunpremitaj en la kamero.
Eblis vidi familiojn en morto

sin tenantajn per la manoj,
rigidaj en agonio.
Nun la kadavroj estis ĵetitaj eksteren,
malsekaj de ŝvito kaj urino,
malpuraj de ekskremento,
kun menstrusango sur la piedoj.

Dekoj da dentistoj
malfermis la buŝojn de l' kadavroj
per hokoj kaj serĉis oron.
Ili uzis martelojn kaj tenaĵojn
por elrompi orajn dentojn
kaj kronojn el la makzeloj.

En la amasmurdejo Belzec
monoksida gaso ne mortigis sufiĉe rapide.
En Auschwitz oni preferis
Ciklonon B, kiu senvivigis
en tri ĝis dek kvin minutoj.

La kadavroj cindriĝis
en grandaj krematorioj.

1992

Muzulmano

Neniu sciis
kiel kaj kiam
tiu vorto eniris
la koncentrejan leksikonon.
Kaj neniu sciis
kiam li mem
transformiĝos
al muzulmano.

Kun la paso de l' tempo
ĉiam pli kaj pli
da prizonuloj
iĝis muzulmanoj.

Kion do signifis
tiu vorto?

Ĝi signifis homon,
kiu perdis ĉiun esperon.
En tia stadio
li komencis
iri malsupren.

Li ekhavis
nebulokulan esprimon -
liaj piedoj trenis sin malrapide.
Eĉ manĝo ne plu interesis lin.
Li estis perdinta sian volon vivi
kaj eĉ se SS viro aŭ hundo
atakis lin, li apenaŭ reagis.
Forestis eĉ la volo ĵetiĝi
sur elektrizitajn dratojn
ĉirkaŭantajn la lagron,
kaj tiamaniere trovi
liberiĝon en morto.

Kun la paso de l' tempo
pli kaj pli da prizonuloj
iĝis muzulmanoj.

Tel-Aviv, aprilo 1992

Tombŝtonoj

Franka, mia dekdujara amikino -
poligloto kaj eksperto pri poezio,
eksterordinara mirinfano,
kiu pereis en la koncentrejo Belsen-Bergen,
ĉi-nokte revenis al mi en sonĝo.

Mi invitis ŝin al mia hejmo
por legi al ŝi mian novan poemon.
Ni diskutis la filozofion de Spinoza
kaj ŝi enkondukis min en la poezion de Rilke.

Mia hejmo frontis al ĝardeno,
en kiu mi konstruis tombejon
por ĉiuj gefamilianoj kaj geamikoj
pereintaj en la flamoj de l' Holokaŭsto.
Ĉiu havis propran tombŝtonon,
sur kiu videblis la nomo
kaj datoj de naskiĝo kaj morto.

Franka atente inspektis ĉiun ŝtonon
kaj, ekvidinte la sian, ekkriis
en timego, forkuris el mia hejmo,
kaj mortis por la dua fojo.

Ekregis terura silento,
en kiu mi restis tute sola.

Tel-Avivo, majo 1992

Gorilo

(Por William Auld)

La reĝo de l' bestoregno
estas el ĉiuj animaloj
la plej forta.

Li manĝas nur plantojn,
neniam tuŝas viandon
kaj batalas nur
por sin defendi.

Do, bestoj de l' bestomondo,
ne timu la gorilon,
eĉ se li pli fortas
ol leono aŭ tigro.

Homoj, ne timu la gorilon --
li estas vegetarano
kaj la pacifisto
de l' bestoregno.

Ne timu la gorilon --
timu la homon!

Tel-Avivo, aprilo 1992

de Gilbert Ledon

Rajto pri vivo kaj mortpuno

En la mondo kaj en Brazilo aparte oni ree parolas pri mortpuno. Atencoj kaj murdoj danĝerege plioftiĝas. Tiu problemo analizendas sub la plej diversaj vidpunktoj, kiujn la nunaj sociordoj (aŭ -malordoj) posedas: religio, politika sistemo, homaj rajtoj, etikaj gvidlinioj, socia kunvivado, ktp., kie sufiĉe alta dozo da hipokriteco kaj malracio, propra al la homa karaktero, postrestas ankaŭ fronte al la plej evidentaj faktoj, kies interpretado ŝajnas esti pli valora ol la faktoj mem.

Vivo kaj etiko

En la analizoj ŝajnas, ke ĉiuj kurentoj de pensado, ĉu mistikaj, ĉu pure raciaj konkordas: la homo, ĉu de la dioj, ĉu de la propra vivofonto (la naturo) ricevis fundamentan rajton pri vivo. Rezultas el tiu rajto, ke la homo por sukcesi en sia postvivado, devas plenumi siajn devojn. Ĉiu homo estas kondamnita de la vivofonto al plenumado de tiuj agoj, taskoj, laboroj (la fama *tripalium*), kiuj ĝuste ebligas tiun vivon per kontentigo de la bezonoj kunligitaj al la vivo mem. Jen fakto, kiun ĉiuj filozofioj kun etikaj principoj kutimas agnoski. Kion ne ĉiuj same akceptas estas, kiel la plenumado de la devoj devas okazi. Jen, politika komplikaĵo, kie la homo moderne venigas al si pli kaj pli da rajtoj por malpli kaj malpli plenumi siajn devojn preter plej elementa homkonforma etiko.

Por simpligi la komprenon de la homkonforma etiko, ni reiru al la principoj de la franca revolucio, kiuj erare prezentis deklaron pri homaj rajtoj. Evidente tiu devizo ne estas homkonforma, ĉar la homoj ne estas fratecaj, egalaj fronte al la rajtoj kaj liberaj en siaj agadoj. La frateco, preter la mistika sento, nur povas elvoki respekton de individuo al alia. Respekto signifas ne atenco, ne agreso de unu individuo al alia. Se okazas atenco aŭ malrespekto - laŭ homkonforma etiko neplenumo de devo en la homa agado -, temas pri krimo, kies aŭtoro estas... punenda.

En nia vivofonto egaleco inter individuoj feliĉe tute ne ekzistas. La egaleco nur povas esprimi la fakton, ke ĉiu havas la saman, egalan (aŭ similan kaj ekvivalentan) oportunun por plenumi sian homan devon por postvivi. Tio estas la nura sociala justo ebla.

La libereco estas la konsekvenco de la

du aliaj principoj. Post, por citi nur la du pensulojn, Murray Rothbarb [Murej Rotbarb] kaj Henri Lepage [Lepaj] en sia verko *Kial la proprietado*, ni povas diri, ke la libereco estas la devo fari kion oni bezonas per tio, kion oni havas. La libereco estas la stato de homo, kiu ne apartenas al mastro, al institucio, kiel la ŝtato, sed al si mem. Fari kion oni bezonas estas agi, labori por produkti la aĵojn, kiuj estas necesaj al la vivo... kaj tio, kion oni havas, estas esence la terpeco, la spaco en la vivofonto, kie ni povas agi por produkti. Tial la nocio pri proprietado fortigas la senton de sekureco, libereco, sendependeco kaj memstareco.

La nura socimalordo

Estas facile konstati, ke nia nuna homsocio sub multaj aspektoj malevoluas, ne nur en ekonomia ekvilibro sed ankaŭ en la sociaj kaj etikaj valoroj. La kaŭzoj estas multaj: manko de kongruo inter la homaj agoj kaj la esenco, la deveno de tiuj agoj, abismo inter la teknologia evoluo kaj la etika stagno, postulo de rajtoj por ne plenumi la devojn, fremdiĝo, kiel diris Bruno Vogelmann en *Nova Realismo*, en la vivmedio pro migrado de la kampoj al la urboj, akcepto de absurdaj sistemoj en ekonomio pro spekulado, ktp. Tiuj malkongruoj kondukas al sociaj mal-ekvilibroj kun psikaj traŭmatoj kaj stresoj. Por fuĝi de tiuj stresoj kaj mal-ekvilibroj la homoj ekuzas drogojn, brutiĝas fronte al televidiloj, fariĝas malrespektaj, atencas, rabŝtelas, ostaĝprenas... kio estas pli facila ol returni al la esenca vivmedio por memstare agi kaj labori.

Kiel konsekvenco de la malkongruoj ni estas meze de demografia eksplodo kio draste komplikas la establon de taŭgaj strukturoj. Jen do la ĉefaj kaŭzoj de la malordo, kiuj atingis neeltenblan nivelon ekzemple en Brazilo. La demando estas, kio estas la solvo?

Mortpuno, ĉu solvo?

La demando ne estas respondebla, krom se ni restas je tre limigitaj kriterioj antaŭestablita. Laŭ tiuj kriterioj ĉio direnda jam estas dirita. Necesas do resti sur praktika tereno.

Laŭ la homkonforma etiko, laŭ la principo de respekto (frateco) elmontrita, estas evidente, ke neniu homo ankaŭ nome de leĝo, rajtas alian homon mortigi. La principo validas por ĉiuj. Sekve kiu mortigas, murdas, ostaĝprenas, ŝtelas, tiu malobeas la naturan principon kaj per la ago mem la malrespektanto sin kondannas kaj ne plu meritas la rajton pri vivo. Ĉar al ago respon-

das reago nepre aperas konflikto... la solvo de la konflikto, kie povas aperi pliaj mortoj, estas logika rezulto de la atenco. Cetere por atencanto aŭ murdisto ni ne bezonas hipokritan juĝadon laŭ homa juro. La ago de malrespekto per si mem estas kondamno. Por ne suferi punon pro malrespekto kaj ĉar el ago nepre aperas reago, la nura solvo estas eviti malrespekton.

En la nuna socio, ni atingis pro la hipokriteco jam aludita, la ridindan situacion, ke la murdistoj havas pli da „rajtoj” ol la viktimoj. Nu, la viktimoj ĝenerale jam estas mortaj, do por ili ĉio estas solvita, ĉu ne? Kial alporti pli da senutilaj agresoj, pli da sango? Sendube la solvo kuŝas en la ordo, en poluro de la socio, per edukado. Sed kiam tiuj instruoj ne venas, aŭ male, kiam la socio putriĝas kiel nun, kion fari?

Verdire mortpuno ne povas esti puno (sufero pro malpermesita faro) eĉ se oni suferas dum la ĉeso de la vivo. Morto nur povas esti konsiderata kiel puno ĉar la mortanto definitive perdas la rajton pri vivo...

Ni ne povas konsideri la eliminadon de rubhomoj per mortigado kiel elegantan, civilize taŭgan solvon. Ni ankaŭ scias, ke mortpuno ne malgravigas la krimecon, sed ni povus demandi, ĉu la plenigo de prizonoj, de karceroj, de punkoncentrejoj ja estas taŭga solvo. La sperto montras, ke tre malofte krimuloj regeneras sin, „boniĝas”. Male, la prizonoj akriĝas la homan agresemon, ke karcero estas la plej bona lernejo por la krimuloj. En Brazilo la gravaj krimuloj en prizonoj, ankoraŭ estras kaj organizas pliajn krimojn kaj sukcesas fuĝi kaj ree murdi, ostaĝpreni dum du, tri aŭ kvar fojoj pliaj ĝis kiam hazarda kuglo sukcesas trafi ilin... feliĉe preter la amnestio de l' hipokriteco.

La problemo postrestas

En Rio de Janeiro en la lastaj ok monatoj okazis 75 ostaĝprenoj al industriistoj kaj komercistoj kun postulo de pluraj milionoj da usonaj dolaroj. En São Paulo en ĉiu tago okazas de 2 al 6 ŝteloj en bankoj, kun mortoj de klientoj dum pafadoj malgraŭ armitaj gardistoj eĉ kun hundoj ĉe la pordoj. Ĉiutage en Brazilo mortas dekoj da homoj pro simpla atenco al la homa respekto... ĉu tiel devas esti? Ĉu temas pri nova, normala ordo? Kaj plej ofte la bandidoj ne estas analfabetoj aŭ mizeruloj sed tutsimple profesiuloj de la krimo ene de la nova ordo.

Se eliminado de rubhomoj en purigado per morto ne solvas la problemon, kiuj estas la aŭtentikaj, tujaj rimedoj, sinjoroj amnestiantoj kaj politikuloj?

HUNGARIO

Rok-operoj

Spite ŝtatan malpermeson, la rok-muziko konkeris ankaŭ Hungarion kaj tie oni povas spekti ankaŭ la famajn rok-operojn. La unua hungara rokopero furoris: Imagita raporto pri usona pop-festivalo, fare de Gábor Presser. La longa titolo prezentas la temon: kiel vivas la junuloj dum tia festivalo? La intrigo konvenis al la komunisma reĝimo: junulo mortas pro narkotaĵo. La teksto estas simpla, sed la muziko plaĉis al la junularo.

Tiun nesupereblan sukceson tamen superis nova rok-opero. Stefano, la reĝo estas ĉefverko de la prestiĝa rok-muzikisto Levente Szörényi [Soreni]. Stefano, hungare István [Ištvan], estas ne nur reĝo, sed ankaŭ fondinto de la hungara kristana reĝlando. Komence de la verko, ĉefpastro preĝas al Dio ĉar paganaj hungaroj volas armile restarigi la paganan vivon. La muziko bone redonas la mezepokan liturgian etoson. Sekvas sovaĝa danco de la paganoj: tiu ĉi numero iĝis la plej granda sukceso de la verko. Kontraste al la kruduloj staras Stefano milde, sed tamen firme, ĉar malantaŭ li la tuta kristanismo staras. Fine, post la venko, psalmo de Stefano estas miljara instruo por la hungaroj: se ili ne integriĝos al Eŭropo – do al la kristanismo – ili pereos.

La komponisto ne imitis la modan rok-muzikon, sed li ĉerpis el la origina popola muziko. Tial la opero estas ne eŭropeca, sed hungareska muzikaĵo.

Jam okazis prezentadoj en Usono kaj en multaj eŭropaj landoj, sed pro sia hungareca muziko, la verko ne konkeros la mondon.

JUHÁSZ Károly

MUZIKA EVOLUO

Nova Esperanta komponaĵo

Pri kio estas muziko, povas esti multaj diversaj opinioj kaj gustoj, speciale en komunumo tre heterogena, kia ekzemple estas la esperantistaro. Tamen, ĝenerale la ŝato de la Esperanto-publiko – almenaŭ laŭ prezentadoj dum la nuntempaj kunvenoj kaj

kongresoj – estas sufiĉe limigita je malmultaj stiloj: folkloro, gitare akompanataj kanzonoj, modaj aŭ popkantoj kaj foje esperantigitaj klasikaj pecoj.

Ke ekzistas ankaŭ esperantlingva muziko avangarda de komponistoj en la akademia tradicio, estas konate al nur malmultaj. Menciindas tiurilate precipe la komponaĵo „La Espero” – himno farita en 1963 laŭ zamenhofa teksto (MONATO raportis pri ĝi). Verŝajne ĝi ŝokus la „samideanojn”, kvankam ĝi apartenas pli bone al nia tempo ol la konata muzikaĵo de F. de Ménil.

Similan verkon ĵus registris kaj disaŭdigis la sud-orient-germana radio. La komponisto Franz-Georg Rössler [Resla] (n. 1949, Germanio) verkis ĝin laŭ teksto mendita de poeto Rikardo Ŝulco. Ĝia titolo *Evoluo* aludas la minacatan bazon de la homa ekzistado en la kosma evoluo – temo nepre aktuala. Kantis ĝin la altkvalita ĥoro *Figuralchor Mainz* gvide de Stefan Weiler, kiu kelkajn monatojn antaŭe ankaŭ prizorgis la unuan prezentadon en Mannheim. Aparte notinde estas, ke la verkon mendis ĉe la aŭtoro la renomata Asocio por Nova Muziko de Mannheim, por kiu jam verkis la tuta elito de la nuntempa komponistogeneracio.

Estus dezirinde, ke ne nur la ekstera publiko, sed ankaŭ la Esperanto-komunumo iom post iom konsciigus pri tiu ĉi branĉo de sia kulturo.

Jakob HAUSMANN

,POP'

Tutmonda muziko

La muziko de ĉi tiu trilanda kunlaboraĵo (subtenita de Germana Esperanto-Junularo kaj Germana Esperanto-Asocio) estis por mi unu el la plej ekscitaj post *Ora team'*. *Tutmonda Muziko* estas triopo: Enzo Picone, Karin Rossow kaj multoble faka Rainer Conrad, ĉionfarulo de la skipo. Gunter kaj Claudia Koch kun Joachim Bauer realigis la tutan koncepton, intencante reklami la Internacian Lingvon. Ili nomis ĝin simple *Esperanto*.

Tamen estas lingva barilo. Conrad verkis ĉiujn tekstojn originale en la angla, kaj eble tiuj estis bonaj. Sed malgraŭ freŝa sento kaj bildaj vortoj, iuj tradukoj de Eckard Bick kaj Adolf Burkhardt bedaŭrinde havas atmosferon de improvizo, ĉar en multaj lokoj la vortemfazo estas kripla. Tre



grava tasko de kantotradukisto estas krei unuecan tuton por melodio kaj poemo, kaj tio ne okazis konsekvence pri ĉi tiu registraĵo: nur la liriko de Frank Stocker alproksimiĝis. Krom la misakcentado ĝenas la fermita o kaj la tro mallonga i (f'Imo anstataŭ filmo) kaj misaj finkonsonantoj: Miest'snur vágabont; Jénju núlinoj; Néfor pašú... eĉ eraro kiel ŝangu anstataŭ ŝanĝu. Pretere, ĉu oni ne volas tuj aŭdi tekston, sen la devo deĉifri ĝin?


Forbalainte la malagrablaĵojn, mi povas koncentriĝi pri la kvalito de ĉi tiu elstara kasedo – mi jam aĉetis la kompakta diskon. La teknika nivelo estas tre bona, kun lerte uzitaj son-efektoj. Rainer Conrad ludas ĉiun muzikilon kaj stampas la kolekton per sia instrumenta *Guitarano*. *Via nokto*, dueto kun Karin Rossow, estas tre energia. Eĉ se ili ne parolas Esperanton, la geartistoj ŝajne sentas kion ili kantas, ĉar la emocia prezento de la „tektoj” estas modela. Karin Rossow meritas aprezon por la protestaj *Tragedio* kaj *Ne plu*, kiuj verve tuŝas la limon inter politika kaj distra muziko, kaj Rainer Conrad amuzas en *Ŝi klasikas, mi rokemas*. *Mia ĝuo*, la sola solaĵo por Enzo Picone, estas sufiĉe rapidira por bone fini ĉi tiun ambician kantaroon, nepr-aĵon do por ĉiu popemulo.

Seán OSBORNE

„Tutmonda muziko” estas havebla ĉe FEL kaj ĉe UEA. Prezo de la kasedo: 400 BEF (FEL) aŭ 22,80 NLG (UEA); prezo de la kompakta disko: 570 BEF (FEL) aŭ 33,60 NLG (UEA). Al tiuj prezoj aldoniĝas la sendkostoj kaj, nur ĉe UEA, 17,50 % da AVI por loĝantoj de EK.

Kontribuojn por la rubriko „muziko” vi sendu al:

Seán Osborne
Hengelveldebrink 276
NL-7544 TW Enschede
Nederlando



Jen recepto el Usono:

Abelĉeloj

Bezوناتaj estas: (por la pasto) 1 taso da pulvorsukero, 1 taso da hakitaj aveloj, 1 taso da kremo, duona taso da butero, 1 ovo, 1 1/2 tasoj da tritika faruno, 1 pinĉaĵo da salo; (por interŝmiri) 5 k-oj da mola butero, 5 k-oj da mielo, 2 k-oj da rumo; (por garni) 1/2 taso da fandita ĉokolado.

Procedu jene: Fandu la sukeron en pato ĝis ĝi iĝas bruna karamelo, aldonu la avelojn kaj enverŝu turnmovante la kremon. La maso bolu dum iom pli ol ses minutoj, ĝis solviĝo de l' karamelo. Ĉion lasu malvarmiĝi.

La karamelon miksu kun la aliaj ingrediencoj por la pasto, kaj knedu ĝis unuecigo. La pastobulon lasu ripozi dum horeto en fridujo.

Poste platrulu la paston (je ĉ. duonfingra dikeco) kaj eltranĉu ĉelformajn keksojn kiujn vi baku je 200°C dum kvaronhoro.


Kirlu la buteron, mielon kaj rumon kaj metu la ŝaŭmon inter du keksoj jam malvarmiĝintaj. Pogute ni verŝas la fanditan ĉokoladon sur unu flanko de la keksoj kaj desegnas abelojn el ĝi per ligna pinto.

Ĉu ne amuze? Sed mi ne sciis, kiom pezas unu taso da io. Mi do prenis mian grandan kaftason kaj provis: rezultigis tragedio. Mi demandis usonan amikinson pri la afero, kiu – mi diras senkompatate – primokis mian stultecon kaj sciigis ke taso entenas kvaronan litron, do 250 cm³.

Mi reproviz, kaj la sukceso estis memorinda. La abelĉeloj eniris mian esperantan receptaron – sed kun grammezuroj, kiujn olda kutimo preferas.

Vi nun certe ridas kun mia amikino, sed malatento de kutimoj en kuirado jam kreis dilemojn kaj debatojn. Se la edzino de la usona prezidinto J. F. Kennedy estus iom pli sciinta pri la manĝ- kaj nemanĝ-kutimoj de baratanoj, ŝi certe estus elektinta alian donacon ol ĝuste bovan haŭton dum ŝtatvizito.

Pli proksime al ni, almenaŭ tempe, estas la kazo de la antaŭlasta prezidant-edzino en Usono. Ŝi malatentis la kutimojn de la moderna mondo, kaj prezentis en revuo recepton por keksoj (mi ne scias kiun, domaĝe), kiu entenis tro da butero kaj da aliaj malsanigaĵoj por la sanema popolo. La nova prezidant-edzino tuj respondis per saniga recepto, kaj venkis ĉi tiun



fojon. Kiel ni vidas, kuirado fine ja regas la mondon. Mi estus tre kontenta, se leganto sendos al mi tiun recepton tiom gravan, por ke ĉiuj ĝin konu. Sed jen alia kekso, ĉi-foje el Svislando.

Brunsluoj

Bezوناتaj estas: 1/2 kg da hakitaj migdaloj, 1/2 kg da pulvor-sukero, 100 g da ĉokolado raspita, 1 k-eto da cinamo, 1/2 k-eto da kariofilo, 1/2 k-eto da bakpulvoro, 3 ovoblankoj, 3 k-oj da kirŝo, 125 g da sukero.

Procedu jene: miksu migdalojn, pul-

vorsukeron, ĉokoladon en ujo. Aldonu la spicojn kaj la bakpulvoron kaj turnmovu. Post mikado de la kirŝo kun la ovoblankoj, verŝu la likvaĵon en la migdalmason kaj knedu paston. Ripozigu dum kelkaj horoj. Ŝutu la sukeron sur la tablon kaj platrulu la paston sur ĝi. Ornamu la pastotavolon per premformoj kaj eltranĉu keksojn, kiujn vi baku je 180°C dum 6 min. Cetere ĉi tiuj keksoj, kiel ĉiuj keksoj kun ovoblanko, iĝas pli bonaj se oni lasas ilin sekiĝi dum nokto antaŭ ol baki ilin.

Viajn kontribuojn por la rubriko „kuirado” sendu al:

Marco Gazzetta
via Antonio Pignatelli 27
Interno 17
I-00153 Roma
Italio

Solvo de la serpenta enigmo novembra.

Gajnintoj

Alvenis nur 8 (ok) respondoj el kiuj 3 estis ĝustaj. Tiel ricevos libropremion nur:

Glauco R. Corrêa (Brazilo)
Jorge J. Llambrás (Usono)
S-ino Censinio (Ĉinio).

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	M	A	T		U	L	O		Ĝ	I
2	A		R	I	K	O	L	T	A	N
3	S	I		G		K	E	R	N	O
4	K	E	R	U	B	O		E	G	
5		N	A		E	M	A	N	A	J
6	I		D	O	L	O			L	A
7	D	I	A	M	E	T	R	O		P
8	E	O		A		I		T	R	A
9	A	M		R	E	V	I		A	N
10	L	A	B	O	R	A	T	O	R	I

anoncetoj

Rulseĝon serĉas esperantistino-invalidino okdo infaneco. Helpu laŭ via ebleco! Ivanova Natalija Dmitrievna, 7-27-2, Krasnojarskij kraj, RUS-663131 Zesosibirsk, Siberio, Ruslando.

Klon ni faru por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? Informas: S-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. (Bonvolu sendi koverton kun via adreso kaj 2 francajn pm je 2,50 F aŭ 2 int. respondkuponojn.)

Samideanoj! Mi kune kun frato /39j.,45j./ akceptas ĉiun laboron en okcidenta Eŭropo. Plej volonte unu - tri monatoj. Ekz. sezonlaboron, vinrikolton, ktp. Ĉu iu povas helpi al ni? Czesław Kucia, PL-58 340 Głuszyca, ul.H.Sienkiewicza 27 m.7, Pollando.

09-16.10.1993 Sant Cugat del Valles (Barcelono) 1-a Internacia kultura kaj turisma semajno. (Informoj ĉe: Hispana Esperanta Fervojista Asocio, Poŝtkesto 15027, 08080 Barcelono, Katalunio, Hispanio.)

Deziras korespondi 32jara Mao Xianggun, Renmingjie 152 Wangdian, Jiaxing, Zhejiang, Ĉinio, pri ĉ.t.

Deziras korespondi sinjoro Česlovas Trucionis, A.Smetonos 1-17, LT-5300 Panevežys, Litovio.

Kun 14-15jaraj knabinoj deziras korespondi Aira Gegermane, Ciemupe str. Mednieku 2, LV-5020 Kegums, Latvio.

La privata komerc-turisma firmao MARAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. **Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj.** Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Viaflankaj demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 MARAN Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Flegistino Ingeborg Schmidt, Am Gebräun 17, D-O-5900 Eisenach/Thüringen, Germanio, deziras korespondi pri diversaj temoj.

KrysUngarkunsiajfilinoj komencas novan vivon ĉe „Verdejo”, 59 Furlong Avenue, Arnold, Nottingham, NG5 7AS, Britio, kie ŝi bonvenigas artikolojn por la arta kaj scienca rubrikaj. Dankegojn al ĉiuj amikoj, kiuj esprimis subtenon dum tre malfacila tempo.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimume 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.

Ŝirpecoj

(anstataŭ monumento)



Christian DECLERCK
FEL

„Senhonte erotikaj kaj senkaŝe aŭtobiografiaj poemoj kantas laŭ sekcioj ĉe kvar amatinoj... Ŝirpecoj antaŭ ĉio honeste atestas laŭ verso de la poeto mem, ke „Amo estas io vivanta, io vivata’.”

(el recenzo de Timothy Brian Carr).

La poemaro „Ŝirpecoj (anstataŭ monumento)” estas havebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, kontraŭ 420 BEF + afranko (sama prezo por loĝantoj de Eŭropa Komunumo kiel por aliaj).



Tiuj ĉi kaj multaj aliaj belaspektaj brakhorloĝoj estas haveblaj ĉe FEL aŭ rekte ĉe la importisto, Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende. Prezo de la dekstra horloĝo 1087 BEF, de la maldekstra 1182 BEF (ambaŭ inkluzive imposton sed ekskluzive afrankon).



Se pezas la vivo sur viaj ŝultroj; se vespere, vi volas kviete ripozi kaj iomete pripensi vian situacion; se vi serĉas ŝancon por esti feliĉa eĉ dum malfacila vivo, la plej sukcesa libro de Phil Bosmans (jam tradukita en 14 lingvojn kaj eldonita en 4 milionoj da ekzempleroj!) helpos vin.

ŜANCO POR FELIĈO

estas plenplena je pripensaĵoj, la tiel nomataj vitaminoj por la koro. Bele eldonita luksa libro kun multaj fotoj. Mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe la distribuanto: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo: 390 Belgaj frankoj + afranko.



Kultura Esperanto-Domo

Kastelo „Gresillon”

F-49150, Francio
tel. 41 89 10 34

Kulturaj aranĝoj 1993

- 24-04 – 1-05** : Internacia renkonto de infanoj
(por la infanoj kiuj jam eklernis la lingvon)
kursoj, promenadoj, distraĵoj, studo de la ĉirkaŭa naturo,
iniciado al metiaj laboroj, verkado de staĝ-gazeto.
- 23-06 – 8-07** : Internacia amika renkonto
kursoj, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, tea-
tra animado antaŭvidita
- 8-07 – 20-07** : Seminario Cseh A-kursoj
Gvidos Eva Bondar
1-a kaj 2-a gradaj kursoj por diverslingvanoj, gvidataj
konversacioj, distraj vesperoj
- 22-07 – 4-08** : Seminario Cseh B-kursoj
Gvidos Eva Bondar
Kursoj 1-a kaj 2-a gradaj, gvidataj konversacioj, uzo de
sorobano, paperfaldo (Kimie Markarian), distraj vesperoj.
- 5-08 – 18-08** : Lernu, praktiku kaj perfektigu
Unua semajno, gramatiko, gvidos F. Boyet
Dua semajno, tradukado, gvidos G. Lagrange
gvidataj konversacioj, distraj vesperoj
- 19-08 – 8-09** : Por la instruantoj
Pedagogia helpo, helpiloj, kursoj, distraĵoj

Laŭ la ebloj, artlaboroj: libro-bindado, korbo-farado, fotoarto, ankaŭ ko-
munaj ekskursoj estos enkondukitaj.

Ĉu vi ŝatas
nian revuon?

Ni ankaŭ
povas presi
vian revuon!

Flandra Esperanto-Ligo, Frank-
rijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

SENNACIULO


Organo de

**Sennacieca Asocio Tutmonda
(SAT)**


kies membroj kontribuas al kreo
de mondo emancipita, tolerema,
sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.

Petu informojn de:
SAT, 67 av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio.



La frivola t-ĉemizo...



kaj la pli deca trikvesto.

La t-ĉemizoj de Flandra Esperanto-Ligo antaŭe havas diskretan mencion pri Esperanto. Ilia dorso
ilustras la lingvan problemon per trafa plurkolora bildo. La ĉemizoj estas haveblaj en nigra (690
BEF + afranko) kaj blanka (550 BEF + afranko) versioj. La trikvestoj estas pli luksaj kaj portas
nur la vorton Esperanto plus emblemon. Ili estas haveblaj en blanka, nigra kaj blua versioj. Ĉiuj
kostas 890 BEF + afranko. Laste, sed ne balaste!, estas akireblaj Monato-t-ĉemizoj orangkoloraj
kun nigra surpriso *Monato*, internacia magazino sendependa. Ili kostas 450 BEF + afranko. Ĉiuj
t-ĉemizoj kaj trikvestoj estas por plenkreskuloj.

Mendu ilin rekte ĉe la nura liveranto: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.